El la decidoj de la fondkunveno : 1. rekomendi al ĉiuj juristoj-esperantistoj aliĝi kiel individuaj membroj al UEA kaj fariĝi fakdelegitoj pri juro; 2. aligi la asocion al ISAE kiel sekcion kaj rekomendi al ĉiuj membroj fariĝi ankaŭ individuaj membroj de ISAE; 3. aligi la asocion, se eble kiel sekcion, al "International Law Association" kaj rekomendi al ĉiuj juristoj-esperantistoj aliĝi kiel individuaj membroj al la naciaj sekcioj de tiu internacia asocio de juristoj. IAJE organizis okaze de la 43-a U.K. en Mainz publikan kunvenon de juristoj, al kiu estis invititaj ĉiuj membroj de IAJE kaj germanaj juristoj neesperantistoj por pritrakti punkton el la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj.

Adreso : S-ro Sven Ziegler, Bjermedevej 62, København BRH, Danlando.

INTERNACIA ASOCIO DE POŝTMARK- KOLEKTANTOJ

Disvastigi Esperanton inter filatelistoj estas nia ĉefa celo. Ni volas montri, kiel uzebla Esperanto estas en la filatela mondo, kiel facile la filatelisto pere de Esperanto interkontaktiĝas kun kolektantoj en aliaj landoj por pliriĉigi sian kolektadon. Nia dua celo estas helpi la filatelistojn en ilia okupado.

I.A.P.K. laboras laŭ la regulo "Esperanto en la praktiko". Ni nome aranĝas filatelajn servojn por niaj membroj. Ekzemple, ni sendas al ili unuataĝajn kovertojn, novajn poŝtmarkojn, okazajn stampojn, kilomiksaĵojn, katalogojn k.t.p. tiel favore preze, ke vere donas profiton por la filatelistoj aliĝi al I.A.P.K. Estas la kunlaboro inter la membroj en la diversaj landoj, kiu ebligas tiujn favorajn servojn. Okaze de tio multaj neesperantistaj filatelistoj apartenas al I.A.P.K. kaj kompreneble nia agado estas tre valora reklamo por la Esperantomovado.

Nian organon **Internacia Poŝtmarka Revuo (I.P.R.)** ni intencas eldoni minimume okfoje dum 1959. Ĝi enhavas

filatelajn artikolojn, ofertojn pri filatelaĵoj, interŝanĝanoncojn, konkursojn, k.t.p. Ĉiuj membroj rajtas unufoje jare anonci pri interŝanĝo de I.P.R. tute senkoste.

La jarkotizo estas unu Usona dolaro. Vi rajtas sendi la kotizon en neuzitaj poŝtmarkoj de via lando, sed ni povas akcepti nur kompletajn memorigajn seriojn tre bonkvalitajn rilate truetaro, centraĵo, gumhavo, k.t.p. Kontraŭ du internaciaj respondkuponoj aŭ neuzitaj poŝtmarkoj de la valoro 20 Usonaj cendoj ni sendos du specimenojn de I.P.R. al vi.

Skribu al la sekretario Ingemar Nordin, Skolvägen 8, Arjäng, Svedujo.

INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA

(fondita en 1948)

La celo: Interkonatigi kaj interfratigi fervojistojn aktivaĵajn kaj pensiitajn en la tuta mondo, kiuj scipovas la lingvon Esperanto. Propagandi Esperanton sur ilia labortereno kaj enpenetrigi ilian idealon en la koncernaj instancoj fervojaj. Kompiladi Fakterminaron fervojan k.t.p.

La Estraro:

Prez.: K. G. J. de Jong, von Liebigweg 26, Amsterdam.

Sekr.: J. Lok, Orteliusstraat 108/III, Amsterdam.

Kas.: E. R. Oosterwijk, Oostzaanstraat 61/II, Amsterdam.

Red.: H. Hoen, von Liebigweg 7/I, Amsterdam.

2a sekr.: Joh. Poptie, Da Costakade 50, Utrecht.

Ĉiuj loĝantaj en Nederlando.

La Sekretario volonte donas pli detalajn informojn, escepte en la ĉisubaj landoj, kie oni turnu sin al la landaj sekretarioj de la Naciaj Asocioj:

Aŭstralio: E. Crowe, 102 Shaftesbury St., Coburg (Victoria).

Aŭstrujo: W. Ulrich, Hugo Wolfstrasse 33, Linz/D.

Belgujo: L. De Bruyne, 40 Devedeleerstraat, Buizingen.

Britujo: C. S. Parry, 80 Sheringham Avenue, Southgate, London, N.14.

Bulgario: Stajko Pizarov, Učebni Kursove, Str. Sejnovo 7, Sofia.

Danlando: P. A. Jakobsen, Byvangs Allé 22, Viby/J.

Finnlando: A. Ruhanainen, Helsinginkatu 6.B.50, Helsinki P.

Franco: Sekr. de FFEA, 11 rue de Milan, Paris 9e.

Germanujo: J. Giessner, Hauptbahnhof 6, Braunschweig.

Hispanujo: D. M. Berges, Cno Monzalbarba 43, Zaragoza.

Italujo: G. Gimelli, Via Donato Creti 61, Bologna.

Jugoslavio: Macić Gradimir, Zmaj Jovina 52/IV, Beograd.

Nederlando: G. van Veldhuizen, Cremerstraat 166, Utrecht.

Norvegujo: S. Kolbrek, Kalbakkstuben, 22/III, Øvre Grorud.

Svedujo: B. Örtengren, Schultz väg 39, Ulriksdal.

Svislando: W. Sonderegger, Albertstrasse 3, Zürich 5.

En la ceteraj landoj oni anoncu sin al la ĝenerala sekr. J. Lok, kiel izola membro. La kotizo por izola membro estas 5 internaciaj respondkuponoj jare, aŭ ekvivalento.

La organo de IFEF, **Bulteno**, aperas alternmonate.

INTERNACIA GEOGRAFA ASOCIO

Fondita en 1955

Celoj. 1. Kunligi ĉiujn esperantistojn kies fako aŭ intereso estas geografio, antropologio, folkloro, arkeologio aŭ iu el la najbaraj sciencoj, kaj stimuli ilin al komuna agado.

2. Klopodi enkonduki la Internacian Lingvon en la fakajn mediojn.

3. Organizi geografiajn entreprenojn kiel seminariojn, tendarojn, ekspediciojn.

4. Kontribui al la solvo de la problemo de geografiaj nomoj en Esperanto, kaj al la preparo kaj eldonado de fakaj terminaroj kaj mapoj.

Membroj. Membro de IGA povas esti ĉiu persono kiu profesie aŭ amatore okupiĝas aŭ interesiĝas pri geografio aŭ iu el la najbaraj fakoj.

Kotizo. 0.50 usona dolaro jare.

Organo. **Geografia Revuo** estas laŭkontrakte la oficiala organo de IGA. Ĝi aperas neregule, kaj la abonprezo estas 1.- usona dolaro por ĉiuj 4 numeroj. Krom tio IGA eldonas **Bulteno**-n, kiu estas senpaga por la membroj.

Lingvo. La oficiala lingvo de IGA estas Esperanto.

Kunvenoj. La jarkunvenoj okazas dum la Universalaĵ Kongresoj de UEA. Krom tio Geografia Semajno estas aranĝota ĉiujare.

Estraro. Prezidanto: Lic. Tibor Sekelj, Kondina 24, Beograd, Jugoslavio.

Sekretario: Ing. Woldemar von der Ley, Ulrichstrasse 18, Tailfingen/Württ., Germanujo.

Kasisto: S-ro A. W. Thomson, 315, Bellegrove Road, Welling, Kent, Britujo.

Reprezentantoj:

Aŭstralio: S-ino Irene Fink, 100, Headingley Rd. Mt. Waverley, (Victoria).

Aŭstrio: D-ro E. J. Görlich, Messenhausergasse 4/2, Wien III.

Ĉeĥoslovakio: Ing. Stefan Veselý, Hviezdoslavova 2, Martin.

Finnlando: S-ro Joel Vilkki, Somero.

Francujo: S-ro Robert Gérard, 45, rue de Vouillé, Paris XV.

Germanujo: Ing. Woldemar von der Ley, Ulrichstrasse 18, Tailfingen/Württ.

Hispanujo: S-ro Adonis G. Meana, Cíaño-Santa Ana, Oviedo.

Hungarujo: D-ro Vicente Toth, V. Marko u. 3/a, Gyákraktár, Budapeŝt.

Izraelo: Otto Koen, Nahariya, POB 101.

Jugoslavio: Marinko Gjivoje, Gornji trg 31/II, Ljubljana.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, Warszawa, Nowy Swiat 27.

Rumanujo: S-ro Julio Csapó, Str. Kinizzi 3, Satu Mare (Regiunea Baia Mare).

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

(fondita 1949)

La Ligo celas kunligi Esperantistajn instruistojn kaj edukistojn tra la mondo, disvastigi la instruadon de Esperanto en lernejoj, pritrakti pedagogiajn temojn en kaj per Esperanto kaj favore influu edukajn instancojn.

La membroj de la Ligo estas landaj instruistaj asocioj.

Ĉiu membro-asocio pagas minimuman kotizon — 6 anglajn ŝilingojn jare — kaj krome laŭ membraro. Ĉiu membro-asocio elektas komitatanon de I.L.E.I. kaj tiu komitato elektas estraron el siaj membroj. En lando, kie ne estas membro-asocio, reprezentanto de I.L.E.I. funkcias.

Ek de 1957, I.L.E.I. akceptas individuajn membrojn en landoj, kie ne estas membro-asocio per simpla abono al la oficiala organo.

La organo de la Ligo estas "Instruista Letero", redaktita de S-ro O. Svantesson, Skonertgatan I, Göteborg Vr., Svedujo. Prezo: 4 sv. kr. por 10 sinsekvaj numeroj. La organo estas interkomunikilo por la membro-asocioj, reprezentantoj kaj ĉiuj abonantoj, kun aktualaĵoj, raporto, artikoloj kaj informoj de la Centra Oficejo.

La Centra Oficejo funkcias Korespondan Servon por lernejoj kaj lerneĵaj instruistoj. Por plej bone efektiviĝi tion, la C.O. registras lernejojn, kie Esperanto estas instruata. Oni registru sin kun plenaj detaloj, kiel eble plej baldaŭ ĉiujare, kun respondkuponon por eventuala respondo. En 1958 starigis skemo por helpi junajn Esperantistojn, per kunligado koresponda kun plenaĵuloj, "GEONKLOJ ESPERANTISTAJ". Administranto: S-ro J. H. Sullivan, 3, Berwick Avenue, Urmston, Manchester, Britujo, kiu donos informojn kontraŭ r.k.

La Ligo estas agnoskita de Unesko, ek de oktobro, 1953, kiel internacia organizaĵo neregistara, kun kiu Unesko havas regulan interŝanĝon de informoj komune interesaj.

Membro-asocioj (aŭ sekcioj) en Aŭstralio, Aŭstrujo, Britujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Italujo, Japanujo, Jugoslavio, Nederlando, Svedujo, Svislando.

Estraro:

Prezidanto: F-ino Jeanne Dedieu, 70, Avenue V. Ségoufin, Toulouse, Francujo.

Sekretario-kasisto: F-ino V. C. Nixon, 183, Woodlands Park Road, Birmingham, 30, Britujo.

Konsilantoj: S-ro E. Bepperling, Grosse Promenade 2a, Wetzlar, Germanujo. D-ro L. Taccani, str. F. Vigano 4, Milano, Italujo. S-ro Oskar Svantesson, Skonertgatan I, Göteborg, Svedujo.

Komitatoj:

F-ino G. Pollard, 45, Second Avenue, Riverton, Okcidenta Aŭstralio.

S-ro L. Gschanes, Fünfhausgasse 16, Wien XV, Aŭstrujo.
S-ro H. Noponen, Hämeenpuisto 31 B 18, Tampere, Finnlando.

S-ro Suzuki Kiyosi, 820, Higasi-Oizumi, Nerimaku, Tokio.

S-ro Borivoj Mihajlović, Dimitrija Tucovića 6, Pančevo, Jugoslavio.

S-ro P. Korte, Prins Bernhardlaan 19, Veendam, Nederlando.

S-ro C. Gacond, Crêt 78, La Sagne (Neuchâtel), Svislando.

Reprezentantoj :

S-ro F. Micoud, B.P., 88 Nemours (Tlemcen), Alĝerio.

S-ro Luc de Marré, Groendaallaan 232, P.c.r. 17.57.73. Antverpeno (Luchtbal), Belgujo.

S-ro Simeon Hesapčiev, Izdatelstvo "Narodna prosveta", Str. Vasil Drumev 5, Sofio, Bulgarujo.

S-ro E. Calvet Prats, Plaza General Sanjurjo 7, Tarraĝona, Hispanujo.

Prof. J. Kohen-Cedek, P.O.B. 7015, Jerusalemo, Izraelo.

S-ro B. S. Ohana, Immeuble Alliance, Arset-el-Maâch, Marrakech, Maroko.

Prof. J. Toczyski, ul. Grunwaldzka 6m. 3, Gdansk-Wreszcz, Pollando.

Prof. Manuel Fernandez Menendez, 21 de Setiembre 2405, Ap. 8, Montevideo, Urugvajo.

S-ro George Falgier, 3622 North Market, St. Louis/13 (Mo.), Usono.

INTERNACIA VERKISTA ASOCIO

Fondita en 1957

La celoj de la Internacia Verkista Asocio (IVA) estas (a) doni firman bazon por solidareco kaj komuna laborado inter ĉiuj verkistoj de la internacia lingvo Esperanto; (b) reprezenti la verkistojn en ĉiuj rilatoj kun la Esperantomovado, kiuj koncernas ilin kiel verkistojn kaj gardi la interesojn de la membroj rilate aŭtorajn rajtojn, honorariojn kaj tradukojn, ankaŭ rilate neesperantistajn eldonejojn; (c) starigi kaj firmigi la bonan reputacion de la esperanta literaturo en ĉiuj rondoj neesperantistaj.

La anoj apartenas al jenaj kategorioj : (I) beletraj verkistoj, t.e., tiuj, kiuj kontribuis originale aŭ traduke al la beletra literaturo de la lingvo Esperanto; (II) fakliteraturaj verkistoj, t.e., tiuj, kiuj verkis aŭ tradukis fakverkojn en la lingvo Esperanto (ekz-e lingvistikajn, medicinajn, sciencajn, k.s.).

Kandidato por aniĝo al IVA devas esti proponita de almenaŭ tri anoj de IVA, kies devo estas samtempe kun la propono liveri liston de la verkoj, kiuj, laŭ ilia opinio, rajtigas la aniĝon de la kandidato. La verkoj devas reprezenti seriozan aldonon kaj pliriĉigon al la literaturo de Esperanto, kaj ili estu laŭeble libroformaj. En esceptaj okazoj, kiam verkisto ankoraŭ ne trovis rimedojn por eldoni sian libron, kaj la manuskripto estas legita de la 3 proponantoj, tia verkisto povas esti akceptita kiel ano de IVA. La anoj voĉdonas por aŭ kontraŭ la kandidato; tiu baloto estas sekreta.

Prezidanto : Mag. William Auld.

Vicprezidanto : Akad. Ivo Rotkvic.

LIGO INTERNACIA DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ

(Fondita en 1950)

Adreso : 20 avenue de Saint-Exupéry, VILLEURBANNE (Rhône), Francujo.

L.I.B.E. celas :

a. unuigi la diversnaciajn blindajn geesperantistojn por frataj kaj komune interesaj interrilatoj kaj por plibonigo de la tutmonda blindula sorto;

b. klopodi por plej granda disvastigo de Esperanto ĉe blindulaj institutoj, asocioj, librejoj, presejoj, konferencoj, k.a.;

c. faciligi la praktikan uzadon de Esperanto por blinduloj per ĉiuj taŭgaj rimedoj : eldonaĵoj, kongresoj, bibliotekoj, informservo, pagservo, kursoj, korespondado, ktp.;

d. reprezenti la blindajn geesperantistojn sur internacia kampo, ĉe vidulaj esperantistaj asocioj aŭ oficialaj instancoj.

L.I.B.E. akceptas kvarkategoriajn membrojn : **aktivajn** (ili estas blinduloj aligantaj indive aŭ kolektive, pere de landaj Esp. asocioj); **honorajn** (ili estas nomataj de la LIBE-estraro el la personoj, kiuj grave helpis la tutmon-

dan blindularon aŭ esperantistaron); **subtenantajn** (personoj aŭ institucioj, kiuj, por helpi la Ligon en la plenumado de ties celo, pagas kotizon almenaŭ egalan al tiu de individua aktiva membro) kaj **donacantajn**.

Jarkotizoj estas: por aktivaj membroj: a) aliĝantaj individue, egalvaloro de 3 steloj; b) aliĝantaj pere de asocio, duona stelo.

Ĝia oficiala organo estas **ESPERANTA LIGILO**, monata revuo fondita de Th. Cart en 1904; brajle eldonata kaj presigata de s-ro Harald Thilander (kiu redaktis ĝin de 1912 ĝis 1958) kaj redaktata de s-ro R. Gonin, 20 avenue de Saint-Exupéry, **VILLEURBANNE** (Rhône), Francujo.

Ciujare L.I.B.E. laŭpove aranĝas Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj, ĝenerale en la kadro de la Universalaj Kongresoj.

La estraro de L.I.B.E. konsistas el:

Prezidanto: s-ro Joseph Kreitz, **Köln-Ehrenfeld**, Philippstrasse 67, Germanujo.

Vicprezidanto: s-ro K. Verlinde, Kromme-Mijdrechtstraat 66/1, **Amsterdam-Z.**, Nederlando.

Cefsekreterio: s-ro R. Gonin, 20 avenue de Saint-Exupéry, **Villeurbanne** (Rhône), Francujo.

Helpsekreteriino: f-ino E. Woodget, Pembroke place 5, Bayeswater, **London W. 2**.

Kasisto: prof. G. Vassio, corso Giulio Cesare 118, **Torino**, Italujo.

Du konsilantoj: s-ino Varma Thilander, Norevågen 4, **Stocksund**, Svedujo, kaj s-ro O. Lehtivaara, Aleksiskivenkatu 22, **Helsinki**, Finnlando.

Ni havas naciajn reprezentantojn en jenaj landoj: **Argentino:** s-ro Jorge Stang, Aldea Brasileira (Dep. Diamante, Prov. E.R.);

Aŭstralio: s-ro Geoffrey N. Wilson, Flat 2 "Parkgate", South Melbourne, Victoria.

Aŭstrujo: s-ro Rudolf Zoch, Hochstrasse 23, Eggenburg, Niederösterreich.

Belgujo: s-ro Koeune-Dandeseux, 17, rue Courte du Pont, Verviers.

Britujo: s-ro Peter Wallace, 52, Westacres Crescent, New-castle-on-Tyne 5.

Bulgarujo: s-ro D. Kolev, Bulevard Tulbuhin 37, Sofia.

Danlando: s-ro Poul Glygaard, Grøndalsvænge Allé 72, København F.

Finnlando: s-ro Einar Juvonen, Pengerkatu 11, Helsinki.

Francujo: s-ro Raymond Gonin, 20 avenue de Saint-Exupéry, **Villeurbanne** (Rhône);

Germanujo: s-ro Joseph Kreitz, (22 c) Köln-Ehrenfeld, Philippstrasse 67.

Hispanujo: s-ro Jacinto Jiménez, Lista 18, Madrid.

Hungarlando: D-ro Miklos Bano, Vagvar-utca 2, Budapest 3.

Italujo: Prof. Guglielmo Vassio, corso Giulio Cesare 118, Torino.

Jugoslavio: s-ro Petar Pesić, Dom Slepkih, Zemun.

Nederlando: s-ro R. Israëls, 2 Exploërmond.

Norvegujo: red. Evald Bendiksen, Rosenkrantzgat. 5, Bergen;

Portugalujo: s-ro José Albuquerque e Castro, Largo des Aviadores 97, Gaia; F-ino Maria Pereira, Rua Francisco Metrass 95, Lisboa.

Svedujo: s-ro Hannes Larsson, Norevågen 4, Stocksund.

Svislando: s-ro Antonio Pellanda, Bahnhofstrasse 395, Elgg (kt. Zürich);

Urugvajo: s-ro Joaquim José Silveira Marquez, Mello, Dep. Cerro Largo.

Usono: s-ro Henry Kruse, 107 Center Avenue, Chatam, N.J.

SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

(Fondita en 1918)
CELOJ

1. — Disvastigi la skoltajn idealojn per Esperanto.
2. — Disvastigi Esperanton inter ĉiulandaj skoltoj.
3. — Krei skoltan literaturon en Esperanto.
4. — Eldoni internacian skoltan gazeton aŭ revuon.
5. — Solidarigi la senton de frateco, komunan ĉe la du movadoj, inter diversnaciaj junuloj.

Centra Komitato

Prezidanto: L. J. Van Gulck, Wolfjagerslei 40, Borgerhout, Antwerpen, Belgujo.

Vic-prezidanto: Douglas Murphy, 7 Constable Road, Ipswich, Britujo.

Redaktoro de "La Skolta Mondo": George Rust, 122 Shirley Avenue, Southampton, Britujo.

Provizora Generala Sekretario kaj Kasisto: Charles Bardsley, 42 Westbourne Street, Oldham, Lancs., Britujo.

Organizo:

1. La Centra Komitato pritraktas la eldonon de la oficiala organo "La Skolta Mondo" kaj kunligas la laboron de la Naciaj Sekcioj.

2. La Naciaj Sekcioj, ĉiu sub la kontrolo de sia nacia agento, estas sendependaj (sed konforme al la statutaro de SEL). Ili fiksis kaj kolektas la jarkotizojn de siaj membroj kaj respondecas pri siaj elspezoj; ili disvendas la oficialan organon "La Skolta Mondo".

Kotizoj: geskoltoj pli ol 18-jaraj 2 ŝil
geskoltoj malpli ol 18-jaraj 1 ŝil 6p.
subtenantoj 3 ŝil

Oficiala organo: "Skolta Mondo" aperas laŭeble.

Jarabono: du anglaj ŝilingoj aŭ 6 internaciaj respond-kuponoj. Abonu ĉe via nacia agento.

Naciaj Agentoj

Aŭstralio: S-ro S. H. Milligan, 274 Mont Albert Rd, Surrey Hills E. 10, Vic.

Belgujo: S-ro C. G. Van Acker, Dolfijnstr. 90, Antwerpen.

Britujo: S-ro C. Bardsley, 42 Westbourne Street, Oldham, Lancs.

Danlando: S-ro Sejer Holgersen, Einarsvej 99, Lyngby, Kopenhago.

Finnlando: S-ro Lassi Vähäjärvi, Ruotsintie, 17, Kemi.

Francujo: S-ro Gilbert Hergott, 39 rue du Pont, Beaugency, Loiret.

Germanujo: S-ro Bernhard Herrman, Agnesstr. 58, München 18, Bavario.

Hispanujo (Skoltoj): S-ro A. Pedro Marqueta, Avenida de Valencia, 32, Zaragoza.

Hispanujo (Skoltinoj): S-ino D. Benavent, Cuba 46, Valencia.

Irlando: S-ro Lorcán ÓhUiginn, 8 Cypress Road, Mount Merrion, Dublin.

Islando: S-ro Eysteinn Sigurdsson: Fossvogsblettur 34, Reykjavik.

Italujo: D-ro Vito de Benedetto, Viale Quattro Venti 150, Romo.

Nederlando: S-ro J. Elias, Arubastraat 19 huis, Amsterdam-W. (Skoltoj).

Nederlando (Skoltinoj): F-ino N. Krijnen, Philips de Tweedestraat 5, 's Hertogenbosch.

Norvegujo: S-ro Lars Kåre Hunnes, Reidulvs gt 15, Trondheim. Poŝgirkonto: 87762.

Nov-Zelando: Kaporalo H. W. Smith, Military Hospital, Trentham, Wellington.

Svedujo: S-ro Curt Bohman, Box 2006, Bergsjö, Hälsingland.

Svislando: F-ino Ruth Burkhart, Gutrainstr. 932, Bassersdorf/Zh.

Usono: S-ro C. Stanley Otto, 20 Harvard Terrace, West Orange, New Jersey.

STUDENTA TUTMONDA ESPERANTISTA LIGO (S.T.E.L.O.)

Fondo. Dum la 43-a U.K. en Mainz, post dujara preparlaboro, oni fondis la Ligon, kaj akceptis statuton.

Celoj. STELO, kiel studenta sekcio de ISAE, celas

a) disvastigi la Internacian Lingvon inter studentoj,
b) antaŭenigi ĝian praktikan aplikadon en internaciaj studentaj rilatoj,

c) akceli la internacian kunlaboron de studentoj-esperantistoj.

Por tiuj celoj la Ligo intencas aranĝi internaciajn renkontiĝojn de studentoj-esperantistoj, pliampleksigi la reton de studentaj delegitoj de UEA, subteni internacian revuon por studentoj-esperantistoj, kaj cetera agi per celtaŭgaj rimedoj.

Organo. La oficiala organo de STELO estas la "Esperantista Studento". Oficialaj informoj de STELO aperos ankaŭ en la "Progreso", kaj eventuale en aliaj gazetoj.

Estraro. La Estraro konsistas el:

Prezidanto: Paul Ciliga, 17 Rue Duguay-Trouin, Paris VIe, Francujo.

Vic-prezidanto: Sven Ziegler, Bjernedevej 62, Kobenhavn-BRH, Danlando.

Sekretario-kasisto: J. C. Wells, Trinity College, Cambridge, Anglujo.

Estraranoj :

Nicola Minnaja, Viale Giulio Cesare 223, Roma, Italujo.
Victor Sadler, Pembroke College, Cambridge, Anglujo.
Philippe Bonnard, Av. de Choisy 119, Paris 13e Francujo.
Mirjana Simić, Zagreb, Krajiška 4, Jugoslavio.
Revizoro : Kerrin Masterman, Caius College, Cambridge, Anglujo.

Landaj Filioj : anoncotaj pere de la gazetaro.

Kotizoj. (a) La individua membrotizo inkluzivas abonon al la "Esperantista Studento". La kotizo estas 13 steloj, tio estas 9 steloj por la "Esperantista Studento", kaj 4 steloj por STELO. Tiuj, kiuj jam pagis la abonkotizon al la "Esperantista Studento", povas fariĝi membroj de STELO je pago de 4 steloj. Tiuj, kiuj abonas al la "Progreso", povas pagi nur 4 stelojn, kaj ne ricevos la "Esperantistan Studenton".

(b) Kolektiva kotizo estas po 3 steloj por ĉiu unuopa membro. La kolektivo estas devigata aboni nur unu ekzempleron de la "Esperantista Studento", se ĝi devigas sin komuniki al siaj membroj ĉiujn oficialajn informojn de la Ligo.

(c) La supraj kotizoj validas por aktivaj membroj de STELO, tio estas tiuj, kiuj studas, aŭ studis ĝis antaŭ du jaroj, en universitato aŭ samranga institucio. Ekzistas ankaŭ apogantaj membroj, kiuj rajtas pagi la saman kotizon, sed estas invititaj subteni la Ligon per pago de pli alta kotizo. Ili ne rajtas al la rabatoj ĉe ISAE.

(d) Kotizoj validas de Aŭgusto al Aŭgusto, tio estas laŭ la universitata, ne la kalendara, jaro. Por la transpago de la kotizoj oni estas petata, uzi stelojn de la Universala Ligo, se tio ne eblas, oni povas pagi per la perantoj de STELO.

Avantaĝoj. Membroj de STELO rajtas al la jenaj rabatoj ĉe ISAE :

Por individua membreco 5 steloj (anstataŭ 10)
por abono al "Scienca Revuo" 15 steloj (anstataŭ 25).

Perantoj. En la nuna momento (Nov. 1958) ekzistas jenaj perantoj de STELO :

Britujo : la Sek.-kasisto, adreso supre.

Francujo : Philippe Bonnard, Avenue de Choisy 119, Paris XIII.

Germanujo (Okc.) : Peter Beiswanger, (14b) Tübingen, Pflieghofstr. 2.

Italujo : Alfredo Maineri, Via Armando Diaz 1-3, Genova.

Jugoslavio : Mirjana Simić, Zagreb, Krajiška 4.

Nederlando : Johan Derks, Prof. Reinwardtlaan 11,

Utrecht.

Pollando : Pettyn Andrzej, Milanówek k/W-wy, ul. Kościuszki 24.

Skandinavio : Sven Ziegler, Bjernedevej 62, København Brh., Danlando.

TUTMONDA ESPERANTISTA KURACISTA ASOCIO (Fondita 1908)

Celo : Disvastigi Esperanton inter kuracistoj, apotekistoj kaj diversaj kunlaborantoj de kuracistoj. Enkonduki Esperanton en medicinajn gazetojn kaj internaciajn kongresojn.

Membraro : Kuracistoj kaj membroj de ĉiuj medicinrilatantaj profesioj : dentkuracistoj, apotekistoj, veterinaroj, flegistoj, k.t.p. Kiel aprobanta membro povas aliĝi ĉiu interesulo.

Kotizo, kun abono al **Medicina Revuo**, eldonita en Japanujo : du dolaroj aŭ samvaloro. Pagojn oni povas fari al U.E.A. (7,50 gld.) aŭ al Internacia Medicina Revuo, 106 rue Général Lotz, Uccle-Bruxelles, Belgujo (100 belgaj francoj ; poŝtekkonto : Bruxelles 2814.51).

Landaj reprezentantoj estas dezirataj.

Estraro : Prezidanto : Prof. D-ro G. Canuto, Torino, Italujo; Vic-Prezidantoj : D-ro R. Maes-Dubois, Bruxelles, Belgujo kaj Prof. H. Yagi, Japanujo; Sekretario : D-ro Jovanović, Jugoslavujo; Kasisto : D-ro P. Kempeneers, 106 rue Général Lotz, Uccle-Bruxelles, Belgujo.

LA UNIVERSALA LIGO

Centra Oficejo : Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.
Tel : 558677; poŝtekkonto : 408826.

La Universala Ligo estis fondata en Hago, la 14an de Aprilo 1942, je la 25a datreveno de la morto de la granda pac-apostolo, D-ro L. L. Zamenhof.

La celo de la U.L. estas ne nur propagandi la ideon de

Mondfederacio kun Mondregistro, sed ankaŭ edukadi la popolojn al la mondĉivitaneco.

La U.L. volas labori por mondo, al kiu ĉiuj homoj sopiras, mondo en kiu ĉiuj nacioj, rasoj kaj religioj havos la samajn rajtojn, kun internacia polica armeo, kun unu komuna lingvo, sen limaj baroj.

Tial la oficiala lingvo de la Universala Ligo estas Esperanto. Tial la U.L. enkondukis universalan monsystemon por plifaciligi la monkalkuladon internacie. Tial la U.L. organizas internacian korespondadon, vojaĝojn, kunvenojn internaciajn, kursojn, k.t.p.

La U.L. eldonas monatan organon (**La Praktiko**) kiel interligilon inter la membroj.

Membroj povas esti ĉiuj, kiuj skribe deklaras aprobi la celon de la Ligo, alportante laŭvolan nombron da simbolaj brikoj. La aliĝo kaj la kontribuo okazas unufoje por la tuta vivo. Pluaj brikoj estas laŭvole kiam ajn aldoneblaj. La prezo de unu briko estas 1 stelo. (La valoro de la "stelo" estas trovebla en ĉi tiu jarlibro en speciala tabelo).

Fundamentaj Membroj estas tiuj kiuj donacas minimume 500 brikojn. Ĉi tiuj membroj ne ricevas la gazeton.

Aktivaj Membroj estas tiuj Liganoj kiuj krom la donaco de unu aŭ pluraj brikoj pagas ankaŭ kotizon de 24 steloj jare. Ili ricevas la periodajn eldonaĵojn de la Ligo, kaj ĝuas diversajn favorojn disponigitajn al la aktiva membraro. La aktiva membreco estas kalkulata ĉiam por kompleta kalendara jaro. "Aktivaj membroj sen gazeto" pagas jare 4 stelojn; ili ne ricevas la organon.

Oni povas fariĝi Dumviva Aktiva Membro pagante kotizon de 500 steloj, unufoje por la tuta vivo.

Ili ricevas la gazeton dum sia tuta vivo, sen plua pago.

La U.L. havas nun 12.217 membrojn.

La Estraro de la Universala Ligo:

Prezidanto: Prof. D-ro Edmond Privat, Neuchâtel, Svisujo.

Vic.-prez.: S-ino Julia Isbrucker, Den Haag, Nederlando.

Sekretario: Andreo Cseh, Den Haag, Nederlando.

Vic.-sek.: F-ino M. H. Vermaas, Rotterdam, Nederlando.

Kasisto: Ing. H. E. L. Voitus van Hamme, Den Haag, Nederlando.

Anoj: A. R. Campbell, Belfast, Nord-Irlando; D-ro

Braz Cosenza, Rio de Janeiro, Brazilo; Delfi Dalmau, Barcelona, Hispanujo; H. J. Hendriksen, Bussum, Nederlando; André Labit, Lille, Francujo; Luigi Minnaja, Romo, Italujo; Oskar Svantesson, Göteborg, Svedujo.

La Universala Ligo estas aliĝinta membro de la Mond-Asocio de Mondfederalistoj, kies sidejo estas en Amsterdam, Keizersgracht 704, Nederlando.

VETERANA ESPERANTISTA KLUBO

1. **La Celo.** Honorigo de vivantaj fruĵaraj batalintoj, kiuj restas fidelaj al nia idealo.

2. **Membraro.** Esperantistoj estiĝas "Veteranoj" post kvardekjara scipovo de Esperanto, kaj "Jubileanoj" post kvindekjara scipovo. La plej malnova membro titoliĝas "Dojeno". Nun estas registritaj 300 Jubileanoj kaj 265 Veteranoj, inter ili la plimulto de Akademiaĵoj.

3. **Kotizo.** Anoj pagas nenun kotizon.

4. **Registro.** De tempo al tempo estas eldonata adreslisto, kaj por registriĝi en ĝi interesatoj estas petataj komuniki al la sekretario Titolon, Nomon, Adreson, Naskiĝjaron, jaron de esperantistiĝo kaj vivokuron kun foto. La nomlisto estas aĉetebla po 3 resp. kup. kaj V.E.K.-insigno po 3 resp. kup. Afranko petata.

5. **Organo.** "Informilo" eldonata de la Esperanto-Muzeo en Wien.

6. **Jarkunveno.** Tio okazas ĉe la Universala Kongreso. Prezidas la plej malnova ĉeestanta membro.

7. **Estraro.**

a. La Dojeno.

b. La Fondinto kaj Sekretario: Maurice Lewin, 33 Kingscroft Ave., Dunstable, Britujo.

c. La Redaktoro de "Informilo".

d. La Prezidinto de la pasinta jarkunveno.

ĈIU SPECIALIGITA ORGANIZAĴO FARU KON-
TRAKTON KUN U.E.A. PRI KUNLABORO. PETU
KONDIĈOJN!

Neneŭtralaj organizoj kunlaborantaj

BUDHANA LIGO ESPERANTISTA

(Fondita en 1925)

Celo. Kunligi en interfrata rondo la budhanajn esperantistojn kaj ĉiujn bonvolemajn homojn, kiuj inklinas al la instruo de la Budho laŭ religia, filozofia aŭ etika vidpunkto por helpi al tutmonda paco.

Estraro.

Prezidanto : Rev. Anuruddha Sthavira (Hindujo).

Vicprezidanto : Ven. Zenkei Ŝibajama (Japanujo).

Anoj : Ven. C. Njanasatta Thero (Cejlono). Ven. Sanchi Asano (Japanujo). S-ro Rihej Nomura (Japanujo). S-ro Jean Ribillard (Francujo).

Sekretariino : F-ino M. E. Bowden (Kimrujo).

Organo. La trimonata revuo "La Budha Lumo" estas alterne eldonita en Japanujo kaj Eŭropo.

Jarkotizo : ok steloj.

Kasistino : F-ino M. E. Bowden, "Clarach", Abbey Drive, Gronant, Prestatyn, (North Wales), Britujo.

Reprezentantoj.

Por Hindujo : Rev. Anuruddha Sthavira, V.V. Research Institute, P.O. Sadhu Ashram, Hoshiapur, East-Punjab, Hindujo.

Por Japanujo : Ven. Sanchi Asano, Kuchisubo, Omishima-chō, Ochi-gun, (Ehime-ken), Japanujo.

Por Sudazio : Ven. C. Njanasatta Thero, Budhana Esperanto-Instituto, "Verda Ermitejo", Kolatenna, Bandarawela, Cejlono.

Por Sudameriko : S-ro Delio Pereira de Souza, "Rio Esperantista", Poŝtkesto 3877, Rio de Janeiro, Brazilo.

Por Eŭropo :

Benelukso : S-ro Marcel Bury, B.P. 89, Liège I, Belgujo.

Britujo : S-ro D. G. Yoxon, 16 Grange Drive, Heswall, (Cheshire), Britujo.

Centra Eŭropo : S-ro F. Moravec, Twedterholz 15, Flensburg-Mürwik, Germanujo.

Orienta Eŭropo : S-ro Wladislaw Misiewicz, Gwardii Ludowej 12/23, Radom, Pollando.

Skandinavio : S-ro A. H. Tähtinen, Mölnalsvägen, Göteborg, Svedujo.

Suda Eŭropo : S-ro Jean Ribillard, 15 Avenue du Ray, Nice, Francujo.

Kunvenoj. Okaze de ĉiu Universala Kongreso de Esperanto.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

(Fondita en 1910)

I.K.U.E. estas internacia asocio de katolikaj esperantistoj. Ĝi celas per Esperanto servi al la katolikismo kaj la katolikaro.

Ĝi klopodas atingi tiun celon per : propagando, landaj ligoj, oficiala organo, enketoj, kongresoj kaj serva organizo.

Ĝia oficiala organo estas **Espero Katolika**, monata revuo fondita en 1903. Sen kontraŭdiro ĉiu abonanto estas rekonata kiel membro de la Ligo.

La jarkotizo estas 6 gld., aŭ egalvaloro.

La centra oficejo estas : "Espero Katolika", Dordrecht, Nederlando.

Redakcio : F-ino T. Durenkamp, Frederikstr. 2, Dordrecht, Nederlando.

Ĝis nun okazis 27 Internaciaj Kongresoj de Katolikaj Esperantistoj, ĉu aparte ĉu en la kadro de la Universalaj Kongresoj.

La ĝenerala estraro konsistas el du reprezentantoj de landoj, kie estas sufiĉe da membro-abonantoj. El tiuj personoj dekonu formas la ĉefestraron.

Prezidanto :

Sac. A. Beckers, paroĝestro, Kwaadmechelen (L), Belgujo.

Sekretario-kasisto :

F-ino T. Durenkamp, Frederikstraat 2, Dordrecht, Nederlando.

Propagando : Sac. L. Thalmaier, Spiegelgasse 211, Landshut, Bayern, Germanujo.

Membroj :

Mons-ro E. Violi, Via Dezza 48, Milano, Italujo;
S-ro N. W. Vigar, 28 Franklands Dr., Adlestone, Surrey, Britujo;

S-ro R. Colas, Rue de Mézières 13, Paris VI, Francujo;
S-ro W. Mudrak, Beatrixgasse 19-9, Wien-40, Aŭstrujo;
Sac. H. Paruzel, paroĥestro, Roza Wielka, pow. Walcz,
woj. Koszalin, Polujo;

S-ro d-ro W. Solzbacher, 6030 Broad Street, Washington
16 D.C. Usono;

Patro Lovro Kiš o.f.m. M. Tita 7, Karlovac, Jugoslavujo.
S-ro A. Pedro Marqueta, Avda de Valencia 32, Zارا-
goza, Hispanujo;

Naciaj reprezentantoj : (poŝtkonto kaj kotizo) :

Argentino : S-ro W. Przewolka, Cas. de Correo 2914,
Buenos Aires, 50 pes.

Aŭstralio : S-ro V. J. Timmins, 73 Alexandria Parade,
Hornsby N.S.W., 12 ŝil.

Aŭstrujo : S-ro W. Mudrak, Beatrixgasse 19/9, Wien III-40,
p.k. 105.713, 40 ŝil.

Belgujo : S-ro H. Audenaert, Beekstraat 6, Lokeren, p.k.
5128.12, 80 frs.

Brazila Resp. : B.E.L., Praça da República 54, 1ª, Rio de
Janeiro, 240 kruz.

Brazilo-São Paulo : F-ino Guiomar Aquino, Delegacia
Fiscal, Sao Paulo - S.P. 240 kruz.

Brita Imperio : S-ro N.W. Vigar, 28 Franklands Drive,
Addlestone, Surrey, Anglujo, 12 ŝil.

Francujo : S-ro Pierre Muffang, 14bis Avenue Galois,
Bourg-la-Reine (Seine) p.k. Paris 224-82. 720 Frs.

Germanujo : S-ro Hans Stahl, Pestalozzistr. 4/1, (13a)
Weiden (Oberpf.) p.k. Nürnberg 634.33 6,75 DM.

Hispanujo : S-ro A. Pedro Marqueta, Avda. de Valencia
32, Zaragoza. 90 pes.

Irlando : S-ro Lorcán O'hUiginn, 8 Cypress Rd. Mt.
Merrion, Co. Dublin.

Italujo : U.E.C.I., via S. Primo 2, Milano, pk. 3/7791 C. C.
Ferrari, 1000 lire.

Jugoslavujo : Resp. Patro Lovro Kiš o.f.m. M. Tita 7,
Karlovac. 500 Din.

Kanado : S-ro Jean Forgeau, 784 Beaubien Est. Montreal
P.Q. 2,— dol.

Nederlando : Kasisto Nederlanda Katoliko, Krugerlaan 195,
Gouda, p.k. 121449, 6,— gld.

Nov-Zelando : D-ro J. Hamvai, 33 Arran St. Avondale,
Auckland, 12 ŝil.

Polujo : S-ro Antono Zoglowek, Roza Wielka, pow. Walcz.
Portugalujo : S-ro Alfredo L. Sales, Bairro Olhavas,
Prédio Nunes, Leiria. 48 esk.

Svisujo : S-ro Paul Scherer, Riffigstr. 60, Emmenbrucke.
fr. 6,75.

Urugvajo : D-ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos (Flor.)
6,60 pes.

Usono : S-ino Wm. McGrogan, 2109 Parkwood Drive. N.W.
Warren, Ohio. U.S.A. 2,— dol.

KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA

K.E.L.I. estas internacia ligo de evangeliaraj esperantistoj
el ĉiuj mondpartoj. Ĝia celo estas duflanka: unue, ĝi volas
krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj
eklezioj; due, ĝi volas inter esperantistoj diskonigi la
Evangelion pri Jesuo Kristo.

Por atingi tiujn celojn la ligo eldonas organon DIA
REGNO, kiun ĉiu membro ricevas. Ĝi aperas ĉiumonate.

Krome K.E.L.I. klopodas disvastigi sian mesaĝon per
propagando, reto de landaj sekcioj, landaj reprezentantoj
kaj misia agado.

Ĉiujare, prefere tuj antaŭ U.K., K.E.L.I. organizas
kongreson de evangeliaraj esperantistoj.

Centra oficejo ĉe la sekretario, Druivenstraat 32, Den
Haag, Nederlando.

Membrokotizo estas 8 svedaj kronoj jare.

Abonprezo de la organo DIA REGNO estas 8 svedaj
kronoj jare.

Estraro :

Prezidanto: H. A. de Hoog, Archimedesweg 68, Amsterdam,
Nederlando.

Sekretario : D. de Boer, Druivenstraat 32, Den Haag,
Nederlando.

Kasisto : Ingvar Lagerström, Kungsgatan 33, Alingsås,
Svedujo.

Anoj: Erik Carlén, Svedujo; S-ino Anna Sandgren-Alamo,
Svedujo; Profesoro W. J. Downes, Britujo; A. Jensen,
Danlando; A. Horsmala, Finnlando; J. Argenta, Fran-
cujo; Erich Quentin, Germanujo; F. Liechti, Svislando;
Profesoro Edward C. Hobbs, Usono.

Finredaktoro de "Dia Regno" : C. P. Brakké, Karel Door-
manlaan 24, Uithoorn, Nederlando.

Administracio de "Dia Regno" : Druivenstraat 32, Den
Haag, Nederlando.

Landaj sekretarioj kaj reprezentantoj :

Brazilo : C. Gomes de Carvalho, Strati Jesuino Arruda 707,
São Paulo.

Britujo : S-ino F. W. White, "White Lodge", Mareschal
Road, Guilford, Surrey.

Danujo : A. Jensen, Skjalm Hvidesgade 16, Kopenhago V.

Finnlando : A. Horsmala, Kämpyläntie 11, Taivaskallio,
Helsinki.

Francujo : H. Dabiezis, Avenue Deboudour 2, Paris 19.

Germanujo : Erich Quentin, (23) Delmenhorst, Schützen-
hofstr. 4.

Italujo : Frederico Balmas, Via Groscavallo 7, Torino.

Japanujo : Udea Masao, 8 Tatekawa-Mati, Maebashi-shi.

Jugoslavujo : F-ino Mira Lovrec, Radiceva 30/prizemno,
Zagreb.

Kanado : F. Enskaitis, P.O.B. 78, Rodney (Ontario).

Nederlando : D. de Boer, Druivenstraat 32, Den Haag.

Norvegujo : Vidar Vik, Daeleneng gt. 23, 1, Oslo.

Sud-Afriko : H. de Jong, 37 de Waal Drive, Estcourt,
Natal.

Svedujo : K. O. Sandgren, Box 87, Östansjö.

Svislando : M. Moreillon, Rue du Beulet 6, Genève.

Usono : Edwin C. Harler Jr, 47 Hardy Road, West Levit-
town, Pa.

KVAKERA ESPERANTISTA SOCIETO

(Fondita en 1921)

Celo : Interesi membrojn de la Societo de Amikoj pri
Esperanto kaj interesi Esperantistojn pri la Societo de
Amikoj.

Membraro : Anoj de la Religia Societo de Amikoj (Kva-
keroj) kaj samkredantoj

Membra kotizo : Kvin ŝilingoj, aŭ egalvaloraj respond-
kuponoj.

Programo :

1. **Eldonado** de la "Kvakera Esperantisto", kvaronjara
bulteno.

2. **Disvastigo** de Kvakera literaturo.

3. **Korespondado** kun demandantoj kaj personoj intere-
sataj el ĉiuj landoj.

4. **Reprezentantoj**, regionaj kaj landaj, sendas raportojn
pri siaj grupoj, k.t.p., taŭgajn paragrafojn kaj tradu-
kajojn por uzo en nia gazeto "K.E.". Ankaŭ ili tradu-
kas "K.E'-ajn" artikolojn por uzo en landaj Kvakeraj
jurnaloj.

Estraro :

Sekr. : Jessie Saunders, Sydney Lodge, Bath Rd., Ventnor,
1 W, Britujo.

Help-sekr. : Guy B. Tordoff, 82 Pendennis Park, Bristol 4,
Britujo.

Kasisto : Antony H. Cadbury, 297 Manningham Lane,
Bradford 8, Yorkshire, Britujo.

Redakcio : J. Saunders, Ventnor, Britujo, Richard Bland,
180 Hollam Rd., Nelson, Lancs., Britujo, Reg. W. Thomas,
7 Ripley Rd., Worthing, Britujo.

Reprezentantoj, landaj kaj regionaj :

Britujo : Nina Curtis, 5 The Avenue, Keynsham, Bristol;
(Bristol) : Guy B. Tordoff, 82 Pendennis Park, Bristol 4.

Francujo Norda : Jacques Martin, 77 Rue Henri, Ghes-
quière, Lomme. Suda : K. G. Perra, 8 Rue St. Charles,
Lyon 3, Rhône.

Germanujo Okc. : Kurt H. Schmidt, Goethe str. 8, Sand/
Kassel.

Usono : Donald R. Broadribb, 600 W., 122nd Str. New York
27, N.Y.

(New Jersey) : Henry Van Etten, Rd 2, Box 319, Absecon.

(New York) : Lee D. Stern, Shadowcliff, Box 271.

EN LA ZAMENHOF-JARO

ĈIU ESPERANTISTO ESTU MEMBRO

ne nur de la organizaĵo de sia fako aŭ viv-
koncepto, sed ankaŭ de

U.E.A. !

Aligu viajn amikojn !

Neneŭtrala Asocio Sendependa

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (S.A.T.)

Sidejo : 67 avenue Gambetta, PARIS-20. Tel. PYR. 87-05.
Poŝtĉeka konto : 1234-22 Paris.

S.A.T. estis fondita en 1921 en Praha, kun la celo :
utiligi praktike Esperanton por interesoj de la Laboristaro
tutmonda;

kiel eble plej bone kaj digne plifaciligi la interrilatojn de
la membroj, tiel kreskigante ĉe ili fortikan senton de
homeca solidaro;

lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiele, ke ili
fariĝu la plej kapablaj kaj plej perfektaj el la tiel noma-
taj internacianoj;

servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj
asocioj, kies celo estas analoga al tiu de SAT;
peri kaj ĉiel helpi al kreado de literaturo (tradukoj
kaj originaloj) spegulanta la idealon de la Asocio.

S.A.T. ne estas partipolitika, sed nur kleriga, eduka,
kultura organizo kun supertendenca bazo rilate la diver-
sajn laboristajn partiojn kaj sindikatmovadojn.

Ĝi eldonas monatan organon, **Sennaciulo**, kaj jarkajeron
de **Sennacieca Revuo** (socipolitika, literatura, ekonomia,
ktp).

Ĝi organizas ĉiujare Kongreson, por trakti organizajn
problemojn, aŭdigi prelegojn kaj praktiki la lingvon. La
lastaj okazis en Nancio, Francio (1954), Linz, Aŭstrio
(1955), Beogrado, Jugoslavio (1956), Roterdamo, Nederl.
(1957) kaj Helsinko, Finnlando (1958). La venonta Kongreso,
la 32-a, okazos de 1-7 aŭg. 1959 en Dortmund, Germanujo.

Samfamilianoj ne ricevas gazeton, nek la jarlibron
(aperantan ĉiu-dujare), sed pagas nur duonan kotizon.
Ĉi tiu kotizo varias laŭ la aĉetpovo en diversaj landoj inter
unu kaj tri dolaroj. La membroj pagas al landaj perantoj.

La Asocio estas gvidata de sesmembra Plenum-Komitato,
kiu prezentas siajn raportojn al la jara kongreso.

Fondinto de la Asocio estas **E. Lanti**, kiu mortis en
januaro 1947, en Meksiko.

SPECIALAJ KULTURAJ AKTIVECOJ

"GRAJNOJ EN VENTO"

La Tutmondaj Interlernejaj Rondoĵoj

(fonditaj en 1956)

"Graĵnoj en Vento" (GEV) estas lerneja organizo super-
politika, superrasa, superreligia. La celo de GEV estas :
a. krei reton de infanaj rondoĵoj sur la tuta terglobo;
b. pruvi la taŭgecon de Esperanto por interrilatoj de tut-
mondaj gelernantoj;
c. helpi al klopodoj enkonduki Esperanton en la lernejojn;
d. labori kun la infanoj por la internacia kunlaboro.

Rondo estas aro de 8—12 klasoj aŭ grupoj. Ĉiu rondo
eldonas 3-foje jare, nome en marto, junio kaj novembro,
komunan gazeton kun verkoj de la gelernantoj. Estas
starigitaj rondoĵoj de 4—8 jaraj infanoj, rondoĵoj de 8—15
jaraj geknaboj, rondoĵoj de 15—20 jaraj junuloj.

La verkoj estas : tekstoj pri reala vivo en la hejmo,
lernejo, vilaĝo, urbo, lando, pri kutimoj, ludoj, festoj,
ĝojoj kaj malfeliĉoj; desegnaĵoj, bildoj, fotoj, prospektoj,
sekigitaj floroj, ktp.

La formato de la folioj estas ĉiam 21 x 29,7 centimetroj.
Ĉiu kunlaboranta klaso aŭ grupo sendas al la rondgvidanto
po 20 ekzempleroj por ĉiu eldono de la gazeto.

Reprezentantoj kaj rondgvidantoj :

S-ro Marcel Erbeta, rue des Pins 66, **Bienne 7**, Svislando.

S-ro Stefano Koŝutiĉ, Adjiĵe 10 II, **Zagreb 2**, Jugoslavio.

S-ro Henri Coulon, **Sainte-Suzanne**, Doubs, Francujo.

S-ino Hilda Melton, Great Barr Comprehensive School,
Birmingham, Anglujo.

S-ro Svobodan Zlatnar, Rimska 7, **Ljubljana**, Jugoslavio.

S-ro Peter Anso, Kastani 24-1, **Tartu**, Estonia SSR.

S-ino B. M. Delgado, 21, West Street, Kettlebrook, **Tam-
worth**, Staffs, Anglujo (speciala rondo por etuloj
4-8-jaraj).

S-ro Hristo Manolov, gimnazio, **Polski Trambes**, **Tirnovsko**,
Bulgario.

Konsilantoj :

S-ro Prof. Francisko Novljan, Badaliĉeva 9a, **Zagreb**,
Jugoslavio.

S-ro D-ro Andreo Albault, redaktoro de Internacia Pedagogia Revuo, 8, Avenue Et. Billières, Toulouse, Francujo.
S-ro D-ro Jozsef Kondor, gimnazio, Kastl bei Amberg, Germanujo.

Informojn sendas la rondgvidantoj kaj la Centra Oficejo en Svislando. Oni aldonu internacian respondkuponon.

Financa kontribuo por helpi al plua disvastigado de la rondoj estas bonvena. Oni sendu ĝin per internacia poŝtmandato al poŝtekkonto: "Grajnoj en Vento", Marcel Erbeta, IVA 9485, rue des Pins 66, Bienne-Biel, Svislando/Suisse.

MAGNETOFONA SERVO DE U.E.A.

(fondita en 1957)

Komisiito:

Rüdiger Eichholz, ĉe Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado.

Taskoj:

1. Kolektado de sonbende registritaj prelegoj, radio-dissendoj, kantoj, kursoj, teatraĵoj kaj ĝenerale interesaj sondokumentoj en aŭ pri Esperanto.
2. Vendado de kopioj de tiuj programoj.
3. Organizado de voĉa korespondado ('voĉpandado').

Metodo.

Ĉiu esperantisto estas petata, kontribui al la pliriĉigo de la jam ekzistanta kolekto. La surbendigoj devas esti neŭtralecaj laŭ la UEA-statuto, lingve senriproĉaj kaj laŭ la teknika vidpunkto de la registro sufiĉe bonkvalitaj. Ĉiu sendinto, kies programo estas akceptita, rajtas ricevi senkoste programojn ĝis la duobla tempodaŭro de la akceptitaj surbendigoj. Sed li devas eventuale pagi por la sonbendmaterialo, se la ensendita sonbendo ne estas sufiĉe longa por surbendigi ĉiujn deziratajn programojn.

Por ke la Magnetofona Servo povu subteni sin mem, estas necese, ke kluboj aŭ individuoj aĉetu kopiojn de la dezirataj programoj. Nur tiel la Magnetofona Servo povas akiri la necesan monon, por aĉeti la sonbendmaterialon de la kolekto kaj por kovri la afrank- kaj administrajn elspezojn. La Magnetofona Servo liveras kopiojn de ĉiuj dezirataj programoj laŭ jenaj kondiĉoj:

Po 1,00 dolaro por 30 minuta kopio plus la kostoj de la sonbendmaterialo:

- 360 metra bobeno = 2 horoj da registraĵo je rapideco 9,5 cm/sek : 2,90 \$
180 metra bobeno = 1 horo da registraĵo je rapideco 9,5 cm/sek : 1,85 \$
45 metra bobeno = 15 minutoj da registraĵo je rapideco 9,5 cm/sek : 0,70 \$

Diversaj kopioj povas esti farataj sur la saman sonbendon, do estas rekomendinde, elekti la programojn tiel, ke ili plenigas tutan unu aŭ duhoran sonbendon. Ekzemple kopioj de la programoj 1,8 - 13, 18, 19, 20, 21 plenigus unu 360 metran sonbendon je rapideco 9,5 cm/sek. La kostoj estus 2,90 \$ + 4,00 \$ = 6,90 \$. Por pli da informoj kaj la plej nova listo skribu al la komisiito.

Listo de haveblaj sonbendoj (1-12-1958)

1. Mag. W. Auld: 'La nuntempa Esperanto-literaturo'. (Surbendigita en Kastelo Grésillon, somero 1957). 30
2. Prof. I. Lapenna: 'La laboroj de UNESKO por interkonigo de popoloj'. (Surbendigita en Kastelo Grésillon, somero 1957) 45
3. Prof. G. Waringhien: 'Pri la Loire-Civilizacio'. (Kastelo Grésillon, somero 1957) 30
4. Ing. R. Watier: 'Modernaj teĥnikaj revolucioj: Atomenergio kaj aŭtomatigo'. (Surbendigita en Kastelo Grésillon, somero 1957) 40
5. D-ro A. Albault: 'La problemo de la malsato en la mondo'. (Surbendigita en Kastelo Grésillon, somero 1957). 40
6. 'Unter dem grünen Stern'. (Germanlingva elsendo de la radiostacio NWDR Hannover dum aprilo 1957 memore al la 40a datreveno de la morto de Zamenhof. (Surbendigita de aŭskultinto) 30
7. Poul Thorsen: "Tri nobelpremiitoj en dana literaturo". (Karl Gjellerup - Henrik Pontoppidan - Johannes V. Jensen). Prelego dum Somera Universitato, Kopenhago 1956 45
8. Poul Thorsen: '12 poemoj el Rozoj kaj Urtikoj'. Voĉlegataj de la aŭtoro kun enkonduko de Kirsten Zacho. 30

9.	Diskutoj kaj voĉdonado pri Esperanto dum la ferma kunsido de la VIII-a Generala Konferenco de UNESKO en Montevideo. Paroladoj en hispana, franca kaj angla lingvoj.	10
10.	Diskutoj pri Esperanto en la Nov-Zelanda parlamento (1958). Surbendigita de radio-elsendo kun anglalingva komentario de David MacGill	15
11.	La urbestro de Mainz invitas esperantistojn al la 43-a U.K.	3
12.	J. H. Sullivan: 'La Esperanto-Movado kaj la Junularo'. (Surbendigita dum la jarkunveno 1958 de la Society of British Esperantist Teachers) . .	30
13.	F. Franceschi: 'Personaj impresoj pri Bulgarujo'. El radioelsendo de radio Sofia, 1958	10
14.	C. W. M. Baans: 'La vivo de Ĉajkovski kun muziko de tiu ĉi komponisto'. (Surbendigita en kunveno de Nederlanda Esp. Asocio 'La Estonto Estas Nia', marto 1958)	100
15.	E. Andersson: 'Vermlando de Selma Lagerlöf kaj la fabelo de Gösta Berling'.	33
16.	E. Andersson kaj B. S. Ågren: 'Impresoj pri Italujo'. (Por radioelsendo de radio-Romo)	25
17.	E. J. Weber: 'La internacia paco kaj nia pensmaniero'. (Parolado ĉe la 23-a kongreso de Novzelanda Esperanto-Asocio, decembro 1957)	40
18.	E. J. Weber: 'Pledo por parola uzo de Esperanto'.	10
19.	Prof. E. Privat: 'Pacaj metodoj de interŝtata kunvivado'. (4 radioprelegetoj de la Svisa Radio surbendigitaj por la Magnetofona Servo)	20
20.	D-ro A. Baur: 'La kvara nacia lingvo de Svislando'. (La Romanĉa lingvo) (Surbendigita de la Svisa Radio por la Magnetofona Servo)	15
21.	D-ro A. Baur: 'La persono de Heinrich Pestalozzi'. (Surbendigo de la Svisa Radio)	5
22.	Poul Thorsen: 'Knut Rasmussen kaj la eskima poezio'. (Dissendata de la dana radio) mez	20
23.	Mark Starr: 'Komparo de Laborist-Movado en Usono kaj Eŭropo'. (Parolado dum SAT-kongreso 1958 en Helsinki)	50
24.	G. Nørgaard: 'La lando kie la reĝo estas muzikdirektisto'. (Pri dana muziko kun ekzemploj)	20
43-a Universala Kongreso de Esperanto		
25.	Solena inaŭguro. (Paroladoj de prof. Canuto, prof.	

	Privat, Inĝ. L. Zamenhof, d-ro Sehl, prof. Delekat, kaj de la oficialaj reprezentantoj de la registaroj. Festparolado de prof. Lapenna)	94
25a.	El sonbendo 25: Nur la parolado de prof. Privat kaj la salutvortoj de Inĝ. L. Zamenhof.	15
25b.	El sonbendo 25: Nur la festparolado de prof. Lapenna	30
26.	Jubilea Festprogramo okaze de la 50-jara Jubileo de la Fondiĝo de UEA. (Parolis prof. Privat, Hans Jakob, H. W. Holmes, Tibor Sekelj, prof. Lapenna)	74
27.	La laboro en la Unua Sekcio. (Paroladoj kaj diskutoj pri la temo 'Reciproka Apezado de la Okcidenta kaj Orienta Kulturaj Valoroj. La Rolo de la Internacia Lingvo')	92
28.	Publika Kunveno de la Akademio de Esperanto kun enkonduka raporto de la prezidanto de la Akademio pri la temo 'La gramatika karaktero de la radikoj en Esperanto'	25
29.	Festo okaze de la duobla jubileo de prof. Lapenna. (Parolis: Prof. Canuto, s-ro Holmes, f-ino Vermaas, prof. Lapenna)	35
30.	Fakkunveno de Internacia Federacio Esperantista Fervojistaj. (S-ro Winkelhaus laŭlegas tradukitan prelegon de la germana fervoja prezidanto s-ro Geitmann: 'Raciigado-Modernigado-Aŭtomatigado ĉe la Germana Federacia Fervojo'.)	20
31.	Fakkunveno de Internacia Geografa Asocio. (Parolis Tibor Sekelj kaj W. v. d. Ley)	20
32.	Fakkunveno de Tutmonda Esperantista Journalista Asocio. Raportoj pri la ĝisnuna agado de la asocio.	15
33.	Solena Fermo. (Parolis i.a. s-ro Stein, prof. Canuto, prof. Lapenna, prof. Waringhien, s-roj Thorsen, Fighiera, Rajski)	80

Internacia Somera Universitato 1958

34.	Prof. Lapenna: 'La Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj'. (Krome inaŭguro de ISU per prof. Sirk)	40
35.	Prof. E. Privat: 'William Penn, Fondinto de Pensilvanio. Proponinto de Eŭropa Parlamento. . . .	55
36.	Ivo Rotkvič: 'Traduki Artverkon, Ĉu Utopio?'	43
37.	Prof. Hideo Yagi: 'Domaĝo de la Atombomboj en Postaj Jaroj.'	30

38.	Prof. Gaston Waringhien : 'Henriko Heine'	60
39.	Prof. G. Canuto : 'La Stratakcidentoj laŭ Medicina Vidpunkto.'	54
40.	D-ro Manfred Sader : 'Nuntempaj problemoj de Psikologia Diagnozarto.'	30
41.	Prof. W. E. Collinson : 'La Etimologio en Naciaj kaj Internacia Lingvoj.'	50
42.	Prof. H. Sirk : 'Ĉu ekzistas Atomoj da Energio ?'	65
43.	Resumo de la kongresaj aranĝoj kaj de la ISU-prelegoj.	90
44.	Invito al la 44-a UK en Varsovio. (Intervjuo kun la Prezidanto de LKK - Impresoj pri Varsovio de la KKS - Rememoroj pri la avo de Ing. Z. Zamenhof - Invito al Varsovio de la Urbestro - Polaj popolkantoj)	24
45.	David MacGill: 'Ludovic Zamenhof' (Anglalingva biografia programo kun diversaj parolantoj kaj muziko. Rekomendinda por solenaĵo kun neesperantistoj)	60

Klarigo.

La nombroj en la lasta kolono indikas la daŭron en minutoj.

KORESPONDA SERVO MONDSKALA
(fondita en 1955)

Celoj. Havigi al la esperantistoj korespondantojn laŭeble konformajn al la deziroj de ĉiu.

Ne lasi la ĵuslernintojn sen korespondantoj eksterlandaj, por interesigi ilin per tiu tuja praktikado de Esperanto kaj instigi ilin resti esperantistoj.

Metodo

1. La K.S.M. centrigas laŭeble ĉiujn dezirojn de korespondado en la tuta mondo kaj estigas slipojn de ĉiuj korespondemuloj alskribintaj.

2. Ĉiuj korespondemuloj rajtas senpage enskribigi sin, sendante al la K.S.M. la jenajn informojn pri si mem :

- a) antaŭnomo kaj familia nomo;
- b) aĝo;
- c) ĉu edz(in)iĝinta aŭ ne;
- d) kompleta adreso;
- e) profesio;
- f) ĉu filatelisto aŭ ne;

g) en kiuj landoj akceptus korespondantojn (almenaŭ 5);

h) kun kiom da korespondantoj konsentus interrilatiĝi.

3. Instruantoj dezirantaj korespondigi siajn gekursanojn kun eksterlandaj esperantistoj petu specialajn foliojn por enskribigi ilin.

4. Ĉiujn aperas en la revuo "ESPERANTO" rubriko de la K.S.M. kun konsiloj rilate al la elekto de korespondantoj kaj indiko de la landoj, el kiuj venis plej multaj adresoj de korespondemuloj.

5. Ĉiu persono, kiu deziras **rekte** ricevi de la K.S.M. adreson de korespondanto petu ĝin, indikante **pri si mem** la samajn informojn kiel sub 2. a) ĝis h) kaj aldonante unu internacian respondkuponon por ĉiu petata korespondanto. Tiel oni povas kombini la sistemojn 2. kaj 5.

Fondinto-Prizorganto de la K.S.M. (al kiu adresu ĉiujn korespondantojn) : Daniel Luez, Laon (Aisne), Francujo.

ARANĜOJ ESPERANTISTAJ EN 1959

INTERNACIAJ KONGRESOJ

44-a Universala Kongreso .	Varsovio, Pollando, 1-8 aŭg.
32-a S.A.T.-Kongreso	Dortmund, Germanujo, 1-7 aŭg.
11-a I.F.E.F.-Kongreso	Linz/Donau, Aŭstrujo, 9-14 majo.
K.E.L.I.-Kongreso	Nyenrode, Breukelen, Nederlando, 25/7-1/8.
T.E.J.O.-Kongreso	Gdansk, Pollando, 25/7-1/8.

LANDAJ KONGRESOJ

se aliĝintaj asocioj reprezentantaj kvaronon de la membraro ĝin postulas per sia subskribo, en tempolimo de tri monatoj, kalkulita de la unua ĝis la lasta subskribo.

La Direktoro ĝin aranĝas plej malfrue du monatojn post ricevo de sufiĉa nombro da subskriboj. Je propono pri statutŝanĝo okazas voĉdono pri ĉiu aparta paragrafo.

Tiu voĉdonado povas nuligi ĉiujn elektojn kaj decidojn, ŝanĝi la Statuton kaj dissolvi la Asocion; krome ĝi povas esprimi sin pri demandoj submetitaj de la Komitato.

43. **Kalkulo de voĉoj.** Ĉiu aliĝinta asocio havas nombron de voĉoj egalan al la nombro de siaj membroj.

Por voĉdonado validas la nombro de la membroj, por kiu la aliĝinta asocio pagis en la jaro antaŭ la voĉdonado. Por novaliĝinta asocio validas la nombro por kiu ĝi jam pagis, sed almenaŭ la minimuma nombro, kiu rajtigas al aliĝo.

En lando kie ne ekzistas aliĝinta landa asocio la membroj voĉdonas individue.

En voĉdono validas la plimulto de la voĉoj esprimitaj. Por ŝanĝi la Statuton, kun la escepto de la par. 6 rilate la sidejojn, aŭ dissolvi la Asocion necesas du trionoj de la esprimitaj voĉoj, kondiĉe ke tiuj voĉoj reprezentu minimume duonon de la membraro.

Ŝanĝo en la Statuto ekvalidas unu monaton post akiro de la aprobo fare de la nederlanda instanco pri jura personeco.

44. **Kontrolo.** La ĝenerala voĉdonado estas skriba, kaj la voĉoj estas kalkulataj 90 tagojn post la forsendo de la voĉdoniloj. La voĉdonilojn kontrolas tri membroj nomitaj de la Komitato. Tiuj membroj skribe certigas la korektecon de la procedo. Komitatanoj rajtas ĉeesti kaj subskribi.

XV. DISSOLVO

45. En okazo de dissolvo, kun observo de par. 1702 de la nederlanda Civila Kodo, la Komitato nomas komisionon, kiu

1. likvidas la kurantajn aferojn de la asocio;
2. indikas la rimedojn por kovri eventualan deficiton aŭ donacas la restantajn havaĵojn al alia Esperanto-organizaĵo, kiun indikas la decido pri dissolvo.

ĜENERALA REGULARO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(Reviziita en Decembro 1956)

1. **Difinoj.** En ĉi tiu Regularo, escepte se la teksto formale montras alian senceon
"La Asocio" signifas "Universala Esperanto-Asocio";
"Membro" signifas membron de iu ajn kategorio;
"Delegito" signifas Delegiton (D), Vicdelegiton (VD), Fakdelegiton (FD) aŭ alian Delegiton de UEA;
"Direktoro" signifas Direktoron de la C.O.

2. **Aliĝkondiĉoj.** La minimuma nombro de membroj (Individuaj aŭ Asociaj) por la aliĝo de esperantista landa organizaĵo laŭ la Par. 13 de la Statuto estas 25.

La kotizo pagota de la esperantistaj organizaĵoj por la Asociaj Membroj estas po 0,25 ned. gld. por ĉiu membro. La aliĝintaj fakaj asocioj (par. 14 de la Statuto) pagas jaran kotizon de 50 n. gld. senkonsidere al la membro-nombro.

Individuaj Membroj ricevas la membrokarton, membro-markojn kaj diversajn eldonaĵojn laŭ la jenaj subkategorioj:

- (i) MJ —Membro kun Jarlibro: la jarlibron.
- (ii) MA —Membro-Abonanto: la jarlibron kaj la monatan gazeton.

(iii) MS —Membro-Subtenanto: la jarlibron kaj la monatan gazeton. Tiu pagas pli altan kotizon por helpi al la organizaĵo.

(iv) Pat. —Patrono: la jarlibron kaj la monatan gazeton. Tiu pagas la dekoblan MA-kotizon por plifortigi la organizaĵon.

(v) DM —Dumviva Membro: tiu pagas 20-oblan MA-kotizon por kovri la kotizon, kiel MA, dum la vivo.

La kotizoj por la Individuaj Membroj estas fiksataj de la Komitato.

La Direktoro fiksas la sumon por ĉiu lando en nacia mono, konforme al la kurzo kaj al la praktikaj bezonoj.

Delegito, Ĉefdelegito aŭ la Direktoro rajtas malakcepti aliĝpeton. En tia okazo ili informu unu la alian. Se malakceptita kandidato tion speciale deziras, oni informas lin pri la motivo. Ĝis tridek tagoj post ricevo de la motivo, tri individuaj membroj rajtas kune peti la Ĝeneralan Sekretarion ke li decidu pri la aliĝo.

3. **Apogantoj.** Kiel apoganto povas esti akceptita ĉiu persono, kiu apogas la celojn de la Asocio. La apoganto pagas unufoje por ĉiam minimuman kotizon, difinitan de la Komitato. La apoganto ricevas specialan ateston sed ne havas iajn rajtojn en la Asocio.

La kotizo por Apoganta Organizaĵo estas 50 ned. gld. Informo pri tiaj organizaĵoj aperas en la jarlibro.

4. **Delegitoj.** La Delegitoj estas elektataj por servi al la membroj kaj por reprezenti la Asocion. Delegito devas esti almenaŭ MA de UEA (ĉe geedzoj oni permesas esceptojn de UEA. Li plenumu laŭeble jenajn kondiĉojn:

Li estu plenaĝa enlandano daŭre loĝanta en sia regiono, abonu kaj regule legu la oficialan revuon, konu bone la Esperantan lingvon kaj movadon, klopodu havi bonajn rilatojn kun la lokaj Esperanto-societoj. Li promesu, sub rezervo de gravaj malhelpoj, zorge plenumi sian oficon dum minimume trijara periodo.

Ĉiu D, VD, FD aŭ aliaj D devas esti Individua Membro jam dum minimume unu jaro antaŭ nomigo.

5. La Delegito prizorgas la administrajn aferojn laŭ la instrukcioj de la Centra Oficejo; konservas en bonordo la leterojn kaj dokumentojn de sia ofico.

6. Vicdelegito helpas kaj anstataŭas la Delegiton. La

reguloj starigitaj por la Delegito validas laŭsence por li.

7. Fakaj Delegitoj estas elektataj pro sia sperto, kaj respondas al tiurilataj informpetoj.

8. Delegito ne rajtas fari en la nomo de UEA mendojn aŭ elspezojn sen skriba permeso de la Direktoro.

9. Delegito rajtas rifuzi la laŭregularan peton de servo, kiun li opinias neakordigebla kun sia honoro aŭ konscienco. Li sciigas pri tio la petinton.

Al membroj, kiuj misuzas la aranĝon de la Asocio, li rajtas rifuzi siajn servojn, informante la petinton kaj la Direktoron.

Propravole farante servojn al ne-membroj, li klopodas varbi ilin por UEA.

10. En landoj, kies asocioj aliĝis, la Landa Asocio nomas aŭ nomigas la Delegitojn, interkonsente kun la Ĉefdelegito. En okazo de malkonsento decidas la Estraro de UEA.

En la aliaj landoj la Delegitoj estas nomataj de la Ĉefdelegito, de la Peranto aŭ de la Direktoro de la C.O., se loĝas en la loko malpli ol dek Individuaj Membroj. En regiono, kie ekzistas minimume dek Individuaj Membroj ili rajtas okazigi kunvenon kaj mem elekti sian Delegiton.

11. La nomoj de ĉiuj novaj Delegitoj estas publikigataj en la oficiala revuo. Se ĝis 60 tagoj post ĝia forsendo neniu membro protestas pro grava kaŭzo, la nomado aŭ elekto fariĝas valida. Intertempe la Delegito funkcias provizore.

Se la Direktoro opinias, ke nova Delegito ne taŭgas por la ofico, li haltigas la publikigon, informante la rifuziton pri siaj motivoj.

Ĝis 30 tagoj post oficiala informo pri kontraŭstaro de iu membro aŭ de la Direktoro, la rifuzito aŭ liaj elektintoj povas peti la finan decidon de la Prezidanto.

Delegito povas esti revokata el sia ofico nur per procedo de oficiala plendo. Se dum la oficeperiodo la rajto nomi Delegiton transiras al Landa Asocio, ĉi tiu ne rajtas elficigi la funkciantajn Delegitojn ĝis la periodfino.

12. Delegito, kiu ne povas funkcii pro foriro el la regiono, grava malsano k.t.p., informu kiel eble plej baldaŭ la Ĉefdelegiton aŭ la Direktoron. Se la Delegito tion ne faras, tiam skribu la Vicdelegito. Nova Delegito

reprenas de la antaŭa Delegito, aŭ de la Vicdelegito, la tutan materialon kaj dokumentaron de UEA.

13. **Ĉefdelegitoj.** Ĉefdelegito prizorgas la administradon en sia regiono, se la Landa Asocio mem ne faras tion.

Laŭ ebleco li faras raporton dum la jarkunveno de la Landa Asocio kaj varbas por UEA.

14. En lando, kies asocio aliĝis al UEA, la Ĉefdelegito estas nomata de la Landa Asocio interkonsente kun la Generala Sekretario.

15. En lando, kies asocio ne aliĝis, la Direktoro nomas, se necese, Ĉefdelegiton aŭ Peranton.

16. **Peranto.** En lando kun malpli ol dek kvin Delegitoj oni kutime ne nomas Ĉefdelegiton. Tamen la Direktoro povas nomi Peranton, kies devoj estas ĝenerale tiuj de Ĉefdelegito.

17. **Administrado.** La kostoj de la Administrado de la Individuaj Membroj kaj aliaj teritoriaj elspezoj estas pagataj per depreno el la enspezoj laŭ procentaĵo. La Estraro starigas la kondiĉojn kaj fiksas laŭ cirkonstancoj la parton, donotan al la Landa Asocio, Ĉefdelegito aŭ Peranto.

La jarpago de aliĝinta organizaĵo por la asociaj membroj ne estas teritoria enspezo kaj iras senrabate al la Centra Kaso. Por la administrado de la asociaj membroj UEA ne donas kompenson, sed liveras proprakoste al la Landa Asocio la bezonatan nombron da membromarkoj kaj membromarkoj.

18. **La Serva Centro de UEA.** estas la oficejo en Genevo. La loka kaj enlanda titolo estas: Bureau International de l'Esperanto.

La Serva Centro ĝuas juran personecon konforme al Art. 60 de la Svisa civila kodo. La Prezidanto povas per aparta skriba rajtigilo transdoni al la Administranto sian rajton laŭleĝe reprezenti la Servan Centron.

La Asocio ne respondecas pri la sindevigoj de la Serva Centro antaŭ la 28a de aprilo 1947.

19. **Servoj.** Al informpetoj kaj al aliaj ne pure administrataj korespondadoj oni ĉiam aldonu:

- (a) membromarkon de UEA por la kuranta jaro.
- (b) respondkarton aŭ enordan poŝtan respondkupupon.

Delegito rajtas malatenti petojn kiuj ne plenumas la ĉi-suprajn kondiĉojn.

En tempolimo de 14 tagoj post ricevo de laŭregula informpeto la Delegito devas ĝin zorge respondi.

Devas esti nepre rifuzataj : petoj de servoj kontraŭ la celo de UEA aŭ la bonaj moroj; petoj havantaj konfidencan karakteron (pri morala indeco, pagokapablo aŭ familiaj cirkonstancoj de persono) kaj ripetitaj petoj de ne-membroj.

20. Dum vojaĝoj membroj povas peti konsilon de la Delegito pri ĉiuj turismaj aferoj kaj lian helpon, se okazis al li malagrablaĵoj en hoteloj, magazenoj, ĉe doganoj aŭ aliaj aŭtoritatoj, k.t.p. Granda perdo de tempo kaj elspezoj estu pagitaj.

La Delegito donas ĉiujn informojn por faciligi la restadon, sed ne estas lia devo iri al rendezuoj, atendi la membrojn en la stacidomo aŭ ilin promeniĝi.

21. Antaŭ ol fari servon, kiu kaŭzus elspezojn, la Delegito demandu la petinton kaj postulu antaŭan pagon. La Delegito ankaŭ rajtas peti antaŭan pagon, aŭ rajtas malakcepti servojn, kiuj necesigas multan tempon, teknikajn konojn, aŭ specialajn klopodojn, por kiuj salajro aŭ maklerpago estas kutimaj. Se li ne volas fari la servon, li respondu kaj sendu laŭeble liston de personoj aŭ firmoj, kiuj prizorgas tiajn negocojn.

22. La Delegito estas respondeca pri bona funkciado de la nomitaj servoj en sia loko. Li zorgu, ke dum lia foresto la korespondadoj estu transdonataj al Vicdelegito.

Interŝanĝo de poŝtmarkoj kaj kartoj, rondirigo de leteroj aŭ petskriboj k.t.p. ne koncernas la servon de informpetado, sekve estas neniel devigaj por la Delegito.

23. **Plendoj.** Plendoj pri malbone faritaj servoj estu klare priskribitaj kaj estu senditaj al la Ĉefdelegito, Peranto, aŭ la Direktoro.

24. Plendoj de membroj kontraŭ aliaj membroj, Delegitoj kaj la Centra Oficejo estu, laŭ la kazo, adresitaj al la Ĉefdelegito, Peranto, aŭ Direktoro de UEA. La ricevinto informiĝas kaj rajtas postuli de ĉiu membro la alsendon de la necesaj dokumentoj. Se la plendo montriĝas ĝusta, oni riproĉas la kulpigiton. Se necese, la Ĝenerala Sekretario aŭ la Direktoro procedas konforme al la sekvantaj artikoloj.

25. **Eksigo el ofico.** Membroj, kiuj malbone plenumis oficon al ili konfiditan de la Asocio, povas en urĝaj kazoj esti haltigitaj en siaj funkcioj per decido de la Direktoro. Pri revoko el la ofico estas kompetenta :

ĉe helpantoj, oficistoj kaj sekretarioj : la persono kiu ilin dungis;

ĉe Delegitoj : la Prezidanto;

ĉe pli altaj ofic-havantoj : La Estraro.

Ofic-havanto povas ankaŭ esti eksigita el sia ofico pro misuzo de konfiditaj monsumoj kaj dokumentoj, aŭ se li misuzas sian titolon aŭ kompetentecon.

En ĉiuj okazoj de eksigo el la ofico la eksigito rajtas apelacii plej malfrue la 30-an tagon post la ricevo de la decido : al la Komitato, se estis kompetenta la Estraro, kaj al la Estraro en ĉiuj aliaj okazoj.

26. En malpli gravaj okazoj la eksigo el ofico povas esti anstataŭigita per oficiala postulo ke la kulpigito eksigu mem, en tempolimo fiksita.

27. **Eksigo el la Asocio.** En okazo de eksigo laŭ par. 20 de la Statuto individua membro aŭ organizaĵo estu informita pri la plendo per registrita letero. La kulpigito rajtas sendi sian defendon en tempolimo de 30 tagoj post ricevo de tiu sciigo. La Estraro aŭ Komitato povas nomi specialan komisionon por esplori la aferon. Kontraŭ la decido de la Estraro la kulpigito rajtas apelacii al la Komitato plej malfrue la 30-an tagon post la ricevo de la decido. La decido de la Komitato estas definitiva.

Se esploro de afero necesigas grandan korespondadon, longan laboron aŭ gravajn elspezojn, la kompetenta instanco rajtas postuli de la partioj la kostojn de la proceduro.

Nova aliĝo de eksigita membro aŭ organizaĵo validas nur, se konsentis la instanco, kiu decidis pri la eksigo.

28. **Elektio de Komitatoj B.** La elekto de la Komitatoj B en la senco de la par. 25(b) de la Statuto okazas laŭ jena maniero :

(a) Je 250 ĉefdelegitoj kaj delegitoj laŭ la stato de la 31-a de decembro de la pasinta jaro estas elektata po unu Komitato B. Ĉiu komencita ducentkvindeko rajtigas al plia Komitato B.

(b) La Direktoro publikigas informon en la oficiala organo de la Asocio, ke okazos la elektoj, precizigas

la nombron de elektotaj Komitatanoj B kaj petas la ĉefdelegitojn kaj delegitojn (ne la vicdelegitojn aŭ fakdelegitojn) sendi proponojn pri kandidatoj kun iliaj skribaj konsentoj ĝis difinita dato, kiu estu proksimume 45 tagoj post la apero de la informo.

- (c) Kvin ĉefdelegitoj aŭ delegitoj rajtas proponi unu kandidaton el inter la individuaj membroj de la Asocio; la kandidato devas skribe konsenti al sia kandidatigo.
- (d) Post la forpaso de la fiksita dato la Direktoro konstatas la nombron de kandidatoj surbaze de valide faritaj proponoj. Se la nombro de kandidatoj ne superas la nombron de elektotaj Komitatanoj B, voĉdonado ne okazas, sed ĉiuj kandidatoj estas konsiderataj kiel elektitaj. Se la nombro de kandidatoj superas tiun de elektotaj Komitatanoj B, la Direktoro kunmetas liston de ĉiuj kandidatoj kaj forsendas ĝin, kune kun la voĉdonilo, al ĉiuj ĉefdelegitoj kaj delegitoj, kiuj rajtas voĉdoni. Samtempe li aŭ ŝi informas pri la nombro de elektotaj Komitatanoj B, pri la limdato por la ricevo de la voĉdoniloj en la oficejo (minimume 45 tagojn post la dato de la forsendo de la voĉdoniloj) kaj pri la maniero de la voĉdono. La voĉdonantoj signas per kruceto la nomojn de tiuj kandidatoj sur la voĉdonilo, por kiuj ili voĉdonas, metas la daton, subskribas la voĉdonilon kaj sendas ĝin en fermita koverto kun la indiko "voĉdonilo B" al la adreso de la oficejo. La malfermado de la kovertoj kaj nombrado de la voĉoj okazas antaŭ komisiono, konsistanta el la Direktoro kaj du individuaj membroj, nomitaj de la Estraro. Ĉefdelegito, delegito aŭ Komitatano rajtas ĉeesti. Ne estas valida tiu voĉdonilo, sur kiu mankas la subskribo, aŭ kiu ne atingas la oficejon en la fiksita tempolimo, aŭ per kiu estas voĉdonite por pli da kandidatoj ol estas la nombro de elektotaj Komitatanoj. Estas elektitaj tiuj kandidatoj, kiuj ricevis plej multe da voĉoj. En okazo de voĉegaleco decidias, se necese, loto. Pri la rezulto aperas informo en la gazeto.

REGULARO

por la elekto de Honoraĵ Membroj (HM) kaj Honoraĵ Prezidantoj (HP) de U.E.A.

I.

(a) La Komitato de U.E.A. povas, surbaze de la par. 10(c) kaj 27 de la Statuto, aparte distingi esperantistojn, kiuj faris gravajn servojn al la tutmonda Esperanto-Movado, per la titolo "Honora Membro" (HM).

(b) Kiel Honora Prezidanto (HP) povas esti nomita nur esperantisto, kiu, krome, havis eksterordinarajn meritojn por U.E.A. Honora Prezidanto rajtas ĉeesti la kunsidojn de la Komitato.

II.

(a) La proponon por elekto de HM aŭ de HP rajtas fari: (1) la Estraro de U.E.A.; (2) minimume tri landaj aŭ fakaj asocioj, aliĝintaj al U.E.A.; (3) kvin komitatanoj de U.E.A., apartenantaj al minimume tri diversaj nacioj.

(b) Al la propono devas esti aldonitaj: (1) mallonga vivpriskribo de la kandidato kun precizaj plej gravaj datoj kaj kun la eventualaj titoloj; (2) listo de verkoj aŭ studoj eventuale publikigitaj en Esperanto aŭ pri la Internacia Lingvo; (3) priskribo de servoj kaj meritoj kun ĉiuj plej gravaj dokumentoj pravigantaj la proponon.

(c) La proponon kaj ĉiujn aldonojn oni direktas al la Komitato pere de la funkcianta Prezidanto de U.E.A. plej malfrue tri monatojn antaŭ la Universala Kongreso de Esperanto.

(d) La Prezidanto aŭ la Komitatano, kiun li aparte komisiis por tiu celo, zorgas pri eventuala kompletigo de la propono kaj funkcias kiel raportanto antaŭ la Komitato.

III.

La Komitato decidias pri la propono dum la Universala Kongreso. Ĝi povas nomi apartan komisionon por plue esplori la proponon. Ĝi povas prokrasti la decidon, se ĝi trovas la proponon nesufiĉe dokumentita.

REGULARO

pri la Honora Patrona Komitato de U.E.A.

I

(a) La Honora Patrona Komitato estas speciala reprezentanta organo de U.E.A., kiu konsistas el nedefinita nombro da membroj, elektitaj por la daŭro de la vivo, de la Komitato de U.E.A. inter lingvistoj, sciencistoj kaj aliaj eminentaj personoj, kiuj faris gravajn servojn al la Esperanto-Movado, kaj mem parolas kaj verkis en la Internacia Lingvo.

(b) Kiel membroj de la Honora Patrona Komitato povas esti elektitaj nur aktivaj aŭ estintaj universitataj profesoroj, membroj de sciencaj akademioj, aŭ personoj kun egalrangaj kvalifikoj.

(c) La membroj de la Honora Patrona Komitato ricevas ĉiujn publikaĵojn de U.E.A. kaj rajtas ĉeesti ĉiujn kunsidojn.

II

(a) La proponon por elekto de la membroj de la HPK rajtas fari: 1) la Estraro de U.E.A.; 2) minimume 3 landaj aŭ fakaj asocioj, aliĝintaj al U.E.A.; 3) 5 komitatanoj de U.E.A. apartenantaj al minimume 3 diversaj regnoj.

(b) Al la propono devas esti aldonitaj: 1) mallonga vivpriskribo de la kandidato kun ĉiuj liaj sciencaj gradoj; 2) listo de verkoj aŭ studoj publikigitaj en naciaj lingvoj kaj en Esperanto; 3) priskribo de la meritoj por la Esperanto-Movado kun ĉiuj plej gravaj dokumentoj pravigantaj la proponon.

(c) La proponon kun ĉiuj aldonoj oni direktas al la Komitato pere de la funkcia Prezidanto de U.E.A. plej malfrue unu monaton antaŭ la Universala Kongreso.

(d) La Prezidanto aŭ la Komitatano, kiun li aparte komisiis por tiu celo, zorgas pri eventuala kompletigo de la propono kaj funkcias kiel raportanto antaŭ la Komitato.

III

La Komitato decidas pri la propono dum la Universala Kongreso. Ĝi povas nomi apartan komisionon por plue esplori la proponon. Ĝi povas prokrasti la decidon, se ĝi trovas la proponon ne sufiĉe dokumentita.

KONGRESA REGULARO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(Reviziita en aŭgusto 1956)

PRINCIPOJ

1. La Universala Kongreso estas internacia manifestacio de la Esperantistaro. Ĝi celas fortigi la solidarecon inter la Esperantistoj, progresigi la movadon kaj studi ĝiajn problemojn.
2. La Komitato de U.E.A. starigas la Kongresan Regularon.
3. U.E.A. kaj la fakaj organizaĵoj prezentas raportojn al la Kongreso. Krome povas esti prezentataj aliaj raportoj pri temoj esperantistaj aŭ pri temo de ĝenerala intereso. Laŭ bezono la Kongreso diskutas ilin kaj voĉdonas en formo de deziresprimoj, kiuj poste estas traktataj de la Komitato de U.E.A. Laŭ ebleco raportas ankaŭ la Akademio de Esperanto.
4. Ordinare okazas unu Universala Kongreso en ĉiu jaro. La Kongreso devas esti invitita de la loka esperantistaro pere de ĝia organizaĵo kaj kun la konsento kaj morala aprobo de la koncerna Landa Asocio. La inviton oficiale subtenu ŝtata aŭ urba instanco aŭ grava organizaĵo (ekz. scienca akademio, universitato, komerca ĉambro k.s.). Laŭ la cirkonstancoj U.E.A. mem povas organizi Universalan Kongreson interkonsente kun la koncerna Landa Asocio.
5. La Estraro de U.E.A. decidas pri la loko kaj tempo de la Universala Kongreso, preparas liston de la traktotaĵoj kaj difinas la laborplanon. La Estraro de U.E.A. nomas la Prezidantojn de la kunsidoj de la Kongreso organizitaj de U.E.A. La Direktoro de la Centra Oficejo de U.E.A. respondecas pri la protokoloj.
6. La Universalan Kongreson prezidas Prezidantaro konsistanta el:
la Prezidanto de UEA;
la Vicprezidantoj de UEA;
la Ĝenerala Sekretario de UEA;

la Prezidantoj de la sekcioj de la Kongreso;
la Rektoro de la Internacia Somera Universitato de la
koncerna Kongreso;
la Prezidanto de la Landa Asocio invitinta la Kon-
greson;
la Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato.

ORGANIZADO

7. La Kongreson organizas Loka Kongresa Komitato (L.K.K.) kiun elektas ĝenerala kunveno de la Loka Esperantistaro kiu invitas la Kongreson. La elekto bezonas la aprobon de la Estraro de la koncerna Landa Asocio. Laŭeble L.K.K. konsistu el:
Prezidanto (ĝeneralaj aferoj);
Unu aŭ vic-prezidantoj (ĝeneralaj aferoj);
Sekretarioj;
Protokolsekretarioj;
Kasisto;
Komisiito por programo;
Komisiito por loĝigado;
Komisiito por ekskursoj;
Komisiito por informado kaj Kongresa Gazetara Servo; (eventuale komisiitoj por aliaj aferoj).
Samtempe estu elektitaj du revizoroj (el kiuj unu estu revizia fakulo) por kontroladi la librotendon kaj aprobi la finan bilancon.
La Konstanta Kongresa Sekretario (K.K.S.) estas komisiita oficisto de U.E.A. kaj estas membro de L.K.K., en kiu li reprezentas la Estraron de U.E.A.
L.K.K. devas skribe akcepti la enhavon de la Kongresa Regularo.
8. Kontraŭ permeso organizi Universalan Kongreson en sia loko, L.K.K. devigas sin pagi al U.E.A. sumon laŭ art. 28. La licencpago estas uzata por la tutmonda propagando de Esperanto laŭ difinoj de la Estraro de U.E.A.
9. Ordinare okazas dum la Universala Kongreso la jenaj oficialaj aranĝoj, kiujn organizas la Estraro de U.E.A.:
Inaŭguro;
Laborkunsidoj (ĝeneralaj kunsidoj kaj kunsidoj de Kongresaj Sekcioj difinitaj de U.E.A.):

Internacia Somera Universitato;
Belartaj Konkursoj;
Solena Fermo.

- La Estraro de U.E.A. difinas la tagordojn kaj eventuale la specialajn temojn traktotajn dum la oficialaj aranĝoj kaj tiujn detalojn kiel eble plej baldaŭ post decido komunikas al L.K.K.
Kutime la Inaŭguro okazas dum la kongresa dimanĉo, la unua ĝenerala kunsido lundon matene, la kunsidoj de la kongresaj sekcioj lundon posttagmeze (kaj se necese mardon antaŭtagmeze), la dua ĝenerala kunsido vendredon antaŭtagmeze, kaj la Solena Fermo sabaton antaŭtagmeze.
10. L.K.K. starigas la programon rilate al aliaj kunvenoj kaj al eksterlaboraj aranĝoj, sed tiu programo devas esti submetita al la aprobo de la Estraro de U.E.A.
 11. L.K.K. devas prezenti al la Estraro de U.E.A. plej malfrue la 31-an de oktobro la jaron antaŭ la Kongreso la laborplanon pri la agado en la antaŭkongresa tempo.
 12. La kongresa buĝeto devas ricevi la aprobon de la Estraro de U.E.A.
 13. Al la Universala Kongreso rajtas aliĝi ĉiu esperantisto kondiĉe ke li rekonu la Kongresan Regularon, submetiĝu al la leĝoj de la lando, kie okazas la kongreso, kaj ke li faru nenion kio povus malutili al la Kongreso. L.K.K. interkonsente kun la Estraro de U.E.A. havas la rajton rifuzi la partoprenon de iu ajn persono en la Universala Kongreso sen la devo doni al la aliĝinto motivon por tio. Tamen L.K.K. interkonsente kun la Estraro de U.E.A. rajtas limigi la nombron de kongresanoj kaj difini la limdaton por aliĝo.
 14. L.K.K. disponigas salonojn senpage por fakaj kunvenoj al rekonitaj kaj organizitaj fakaj asocioj aliĝintaj al U.E.A. aŭ en kontraktaj rilatoj kun U.E.A. Salonojn L.K.K. povas laŭ sia bontrovo disponigi al aliaj asocioj kontraŭ pago de la koncerna lupago. Al individuoj L.K.K. ne disponigas salonojn.
 15. L.K.K. devas akcepti la Konstantan Kongresan Sekretarion (K.K.S.) de plej malfrue la 1-an de oktobro en la jaro antaŭ la koncerna Universala Kongreso ĝis 3 semajnoj post la kongreso. L.K.K. devas klopodi por

akiro de labor- kaj restad-permesoj por K.K.S. por la periodo de lia restado en la lando. L.K.K. se necese devas havigi al K.K.S. konvenan loĝejon kaj laborejon (oficejon).

16. K.K.S. respondecas pri sia laboro al la Estraro de U.E.A. Lia devo estas atenti, ke la preparlaboroj de la Kongreso disvolviĝu en la kadroj de la Statuto de U.E.A., de tiu ĉi Kongresa Regularo, de la gvidaj principoj de U.E.A. kaj de la aprobita buĝeto. Se li rimarkas tiurilatajn deflankiĝojn, li devas pri ili tuj atentigi L.K.K. En okazo de neinterkonsento K.K.S. sciigu la Estraron de U.E.A. pere de la Estrarano komisiita pri Kongresoj. Ĝis decido de la Estraro li rajtas rifuzi la plenumon de neregula decido.
17. La adresojn de la kongresanoj oni ne rajtas publikigi aŭ transdoni al iu ajn persono aŭ organizaĵo sen la permeso de U.E.A.

ADMINISTRADO

18. La Konstanta Kongresa Sekretario havas la taskon pere de protokoloj informi la Estraron de U.E.A. kaj la Direktoron de la Centra Oficejo de U.E.A. pri la decidoj de L.K.K. Tuj en la komenco de la kongresa agado la kasisto kaj/aŭ librotenisto devas komenci la librotenadon laŭ interkonsento kun K.K.S. Je alveno de K.K.S. la librotenisto devas montri al li la librojn ĝisdate enskribitajn por konstati ĉu la ĝistia laboro estas farita en la senco de la art. 16 de tiu ĉi Regularo.
19. K.K.S. faras la kontorajn laborojn (librotenado, korespondado k.s.), redaktas la kongresan libron kaj zorgas pri la bona progresigo de la kongresaj preparoj. K.K.S. faras la statistikon de la kongresanoj kaj ĉiumonate dissendas Oficialan Komunikaĵon al la Esperanta Gazetaro kaj radiostacioj uzantaj Esperanton. K.K.S. ĉiumonate sendas Oficialan Raporton pri la evoluo de la kongresaj aferoj al la Komisiito de la Estraro por Kongresaj Aferoj. K.K.S. estas dungita oficisto de U.E.A. kaj estas rekte respondeca al ĝia Estraro pere de la Ĝenerala Sekretario. L.K.K. siavice rekonas la sperton kaj kompetenton de K.K.S. kaj priatentas liajn konsilojn kaj rekomendojn.

20. K.K.S. devas atenti, ke neniuj dokumentoj estu disdonataj en la Kongreso sen antaŭa aprobo de la Estraro de U.E.A.
21. K.K.S. devas konservi por U.E.A. po 3 ekzempleroj de ĉiu dokumento de la Kongreso kaj de ĉiuj presaĵoj.
22. Senpagaj kongresaj kartoj estas donataj al ĉiu komitatano de U.E.A., al la Honoraj Prezidantoj de U.E.A., al la membroj de la Honora Patrona Komitato, al la Direktoro de la Centra Oficejo de U.E.A., al la Redaktoro de "Esperanto", al K.K.S. kaj al la anoj de L.K.K. "Honorajn" Kongresajn Kartojn ricevas ĉiuj membroj de la Honora Komitato kaj ankaŭ kelkaj eminentuloj proponitaj de L.K.K., post la aprobo de la Estraro de U.E.A.
23. L.K.K. eldonas kongresan libron, kiu enhavas la oficialan kongresan programon, la tagordon de la Inaŭguro, tagordojn de la ĝeneralaj kunsidoj, programojn de la sekciaj kunsidoj, detalojn de la Belartaj kaj aliaj konkursoj de U.E.A., tagordon de la Ferma Kunsido kaj eventuale iajn oficialajn komunikojn de U.E.A. Aldone al tio L.K.K. povas presigi informojn kaj reklamojn utilajn por la kongresanoj, sed nenian aferojn, kiuj povus kompromiti la neŭtralecon aŭ reputacion de U.E.A., kies organo ĝi estas. Se iel eble, la kongresa libro estu sendata al la aliĝintaj kongresanoj almenaŭ unu monaton antaŭ la Kongreso.
24. L.K.K. funkciigas Gazetaran Servon, kiu periode informu la gazetaron, novajagentejojn, radion, kinon kaj televidon.

FINANCOJ

25. La baza kongreso-kotizo estas 20,— n.gld. ĝis la 31-a de decembro en la jaro antaŭ la kongresa jaro, 22,50 n.gld. post tiu dato ĝis la 31-a de marto en la kongresa jaro, 25,— n.gld. de tiu dato ĝis la 30-a de junio en la kongresa jaro. Principe post tiu dato L.K.K. ne akceptas aliĝojn. Individuaj membroj de U.E.A. (tiuj membroj, kiuj ricevas minimume la jarlibron) rajtas rabaton de 5,— n.gld. en ĉiu periodo citita. La krompago de neindividuaj membroj de U.E.A. (5,— n.gld.) iras al aparta kazo de U.E.A. je dispono de

la Estraro de U.E.A. por propagandaj celoj. La kotizo por edz(in)o de kongresan(in)o estas la duono de la cititaj prezoj. La rabato por edz(in)o de membroj de U.E.A. laŭ la ĉi-supra difino estas 2,50 n.gld. Junul(in)oj ĝis 20-jaraĝaj kaj la regulaj studentoj ĝis 30-jaraĝaj (kiuj tion dokumentas per atestilo de la fakultato) pagas resp. 7,50 n.gld. kaj 12,50 n.gld.

Infanoj ĝis 13 jaroj rajtas senpagan kongreskarton. Blindulo, kies aliĝon akompanas atestilo de blindula asocio aŭ okulkuracisto, ricevas senpagan kongresan karton ĝis la 31-a de marto en la kongresa jaro. Ankaŭ la atestita gvidanto de la koncerna blindulo ricevas senpagan karton. Post tiu dato ĉiu koncerna persono pagas po duono de la tiuperioda kotizo.

26. L.K.K. akceptas donacojn por "Blindula Kaso", kiu estos disponigita por blindulaj esperantistaj aranĝoj. L.K.K. kolektas donacojn por "Literatura Kaso", kiu celas kuraĝigi la Esperantan literaturon kaj konsistigi premiojn por la Belartaj Konkursoj. La donacojn por la "Adopta Kaso" estos utiligataj por helpi la partoprenon en la Kongreso de esperantistoj venintaj el landoj kie transsendo de mono estas malfacila aŭ neebla, aŭ tiuj en malfacilaj financaj situacioj. L.K.K. decidis pri la "Blindula Kaso", la Estraro de U.E.A. interkonsentas kun la komisiito por Belartaj Konkursoj pri la "Literatura Kaso", la Estraro de U.E.A. pri la havaĵo de la "Adopta Kaso".
27. En la komenco de la kongresa laboro L.K.K. starigas "Garantian Kapitalon" por kovri eventualan deficiton. Al tiu kapitalo U.E.A. kontribuas per garantio de unu triono de la jam kolektita sumo je la 31-a de marto de la kongresa jaro. Sindevigoj je pli ol 500,— n.gld. devas esti aprobitaj per decido de L.K.K. Tio ne validas por normalaj administrataj elspezoj.
28. L.K.K. pagas al U.E.A. 30% de ĉiuj kotizoj ricevitaĵ de individuaj membroj de U.E.A.; cetera 30% de ĉiuj kotizoj de nemembroj individuaj de U.E.A., kalkulitaj post deprenado de la ekstraj 5,— n.gld.; tiuj ekstraj 5,— n.gld. estu rekte transdonitaj al U.E.A. Duono de la

menciitaj 30% estas konsiderata kiel licencpago (art. 8 de tiu ĉi Regularo). K.K.S. devas ĉiumonate sciigi la sumon al U.E.A. pere de la Direktoro de la Centra Oficejo de U.E.A. kaj enskribi ĝin je la kredito de U.E.A. en la libroj de la Kongreso.

29. Eventuala monprofito de la Kongreso estu uzota por propagandaj celoj. El eventuala profito 50% iras al U.E.A.; 30% al la Landa Asocio kaj la resto estas uzata laŭ la decido de L.K.K.
30. En okazo de deficitado rezulte de la Kongreso, L.K.K. estas respondeca pri likvido de ĉiuj ŝuldoj. Unuavice estu utiligata proporcie la garantiita kapitalo.
31. U.E.A. pagas la vojaĝelspezojn de K.K.S. de unu kongresa urbo al alia.
32. U.E.A. pagas la salajron de K.K.S. fiksitajn de la Estraro de U.E.A. En okazo de monprofito rezulte de la Kongreso, L.K.K. post aprobo de la Estraro de U.E.A. rajtas doni al K.K.S. specialan honorarion se oni opinias, ke lia laboro grave influis la rezulton.
33. En ĉiu Universala Kongreso estu bonaspekta libroŝtando, kiun prizorgas la L.K.K. dum la tuta Kongreso. La neta profito iras al la Kongresa Kaso.
34. L.K.K. devas plej malfrue ses monatojn post la Universala Kongreso sendi al U.E.A. spezubilancon de la Kongreso kun la revizia raporto.
35. Ĉiuj oficialaj leteroj kaj sinturnoj al la Kongreso estas propraĵo de U.E.A. kaj estu senditaj al la Centra Oficejo de U.E.A. post la Kongreso.
36. Por ĉiu demando ne traktita en ĉi tiu Kongresa Regularo validas la Statuto de U.E.A. aŭ ĝiaj Regularoj. En okazo de dubo aŭ malkonsento koncerne la interpretadon de ĉi tiu Kongresa Regularo decidis la Estraro de U.E.A.

☆

☆

☆

Internacia Somera Universitato

Regularo

Art. 1

(a) La Internacia Somera Universitato (I.S.U.) estas speciala kultura institucio de Universala Esperanto-Asocio. Ĝia celo estas popularigi ĉiujn sciencajn kaj artajn branĉojn pere de la Internacia Lingvo kaj evoluigi la Esperantan sciencan kaj priartan literaturon.

(b) La I.S.U. funkcias regule dum la U.K. de U.E.A., sed la Estraro rajtas decidi ke ĝi okazu ankaŭ aliloke, ekster la kadro de la U.K.

Art. 2

(a) En la I.S.U. rajtas prelegi universitataj profesoroj kaj aliaj kvalifikitaj personoj, kiuj havas la rajton instrui en universitatoj aŭ en samrangaj lernejoj laŭ la leĝoj de siaj landoj. Escepte, en la I.S.U. povas prelegi ankaŭ rekonitaj fakuloj pri sciencaj aŭ artaj temoj, sed ilia nombro devas ne superi la nombron de prelegantoj kvalifikitaj por supera instruado.

(b) La preleĝoj estas farataj nur en la Internacia Lingvo. Ili daŭru ĉirkaŭ 45 minutojn.

(c) Ĉiu preleganto ĝuas plenan pensoliberecon.

Art. 3

(a) Komence de ĉiu laborperiodo de la I.S.U. la prelegantoj de tiu periodo elektas la rektoron de I.S.U. por unu jaro, t.e. ĝis la sekva periodo.

(b) La rektoro estu, laŭ la ebleco, ŝtatanano de tiu lando en kiu funkcias la I.S.U. dum tiu laborperiodo.

(c) La rektoro prezidas la I.S.U. kaj, kune kun la konstanta sekretario, reprezentas ĝin antaŭ ĉiuj sciencaj kaj kulturaj institucioj, kaj antaŭ la ŝtataj kaj internaciaj aŭtoritatoj dum la periodo de sia ofico.

Art. 4

(a) La Estraro de U.E.A. nomas la konstantan sekretario de I.S.U. por la periodo de tri jaroj, sed li povas esti eksigata de sia ofico ankaŭ pli frue, se la Estraro de U.E.A. tion opinias oportuna. La konstanta sekretario estu universitata profesoro aŭ rajtigita instrui en universitatoj aŭ en samrangaj lernejoj laŭ la leĝoj de sia lando. Li estu membro de U.E.A. kaj, laŭ ebleco, komitatano de U.E.A.

(b) Ĉiuj personoj, kiuj plenumas la kondiĉojn en art. 2 (a) kaj deziras prelegi dum la sekva laborperiodo de la I.S.U., devas sin anonci al la konstanta sekretario de la I.S.U. plej malfrue ĝis la 1-a de Marto, aldonante mallongan biografieton, la titolon de la proponata preleĝo kaj skizitan resumon pri ĝi.

(c) La konstanta sekretario de I.S.U., en interkonsento kun la rektoro, submetos ĉiujn anoncitajn preleĝojn plej malfrue la 15-an de Marto al la Estraro de U.E.A. pere de la ĝenerala sekretario de la Asocio. Se la konstanta sekretario aŭ la rektoro opinias, ke unu aŭ pluraj preleĝoj ne estas taŭgaj, ĉar ili ne respondas al la principoj de tiu ĉi regularo, ili tion mencias. Subbaze de la faritaj proponoj kaj de la eventualaj rimarkoj de la konstanta sekretario aŭ de la rektoro, la Estraro de U.E.A. fiksos la definitivan programon de la sekva laborperiodo.

(d) Ne povas esti allasita preleĝo, kiun kaj la rektoro kaj la konstanta sekretario konsideras nekonforma al tiu ĉi regularo.

Art. 5

(a) Se la I.S.U. funkcias en la kadro de la U.K., la koncerna L.K.K. havigas konvenajn ejojn, laŭ ebleco en la universitato, prizorgas la necesan diskonigon de la preleĝoj kaj antaŭvidas en sia buĝeto la necesajn materiajn rimedojn.

(b) Laŭ la ebleco la Estraro de U.E.A. aranĝas, ke la preleĝoj estu ĉiujare presitaj en aparta libro. Ĉiuj prelegantoj transdonas al U.E.A. ĉiujn rajtojn koncerne la faritan lekcion. La konstanta sekretario kolektas la manuskriptojn kaj preparas ilin por presigo.

Regularo pri la belartaj konkursoj de U.E.A.

Art. 1

(1) La Belartaj Konkursoj havas la celon evoluigi la artojn en kaj pere de la Internacia Lingvo. Ili okazas sub aŭspicio de U.E.A. dum la universalaj kongresoj de Esperanto.

(2) La belartaj konkursoj enhavas jenajn branĉojn :

(A) Literatura Sekcio :

(a) Poezio originala (maksimume 108 versoj per 1-3 poemoj)

(b) Poezio traduka (maksimume 108 versoj per 1-3 poemoj)

(c) Prozo originala (maksimume 200 x 65 maŝinskribitaj spacoj)

(d) Prozo traduka (maksimume 200 x 65 maŝinskribitaj spacoj)

(e) Teatraĵo originala (Ludodaŭro maks. 25 min.)

(f) Teatraĵo traduka (Ludodaŭro maks. 25 min.)

(3) La Estraro de U.E.A. povas decidi, ke iu konkurso enhavu ankaŭ aliajn branĉojn aŭ sekciojn, ekzemple muzikon, dancon, fotografion, arton grafikan kaj plastikan kt.p., laŭ la principoj de tiu ĉi regularo.

Art. 2

(1) Rajtas konkursi ĉiu esperantist/in/o, kiu aliĝis al la koncerna U.K. aŭ kiu estas individua membro de U.E.A. —Unu persono povas partopreni per maks. 3 verkoj en la branĉoj prozo kaj dramo. Pri la poezio vidu 2 (A) (a) kaj (b). Por kovri la elspezojn de la korespondado, ĉiu konkursanto aldonu (se tion permesas la poŝtreguloj de lia lando) tri korekte stampitajn respondkuponojn, egale ĉu li konkursas en unu aŭ en pluraj branĉoj.

(2) La konkursanto devas signi ĉiun partoprenafon per pseŭdonimo kaj aldoni — se eble, en fermita koverto — slipon kun la pseŭdonimo kaj la vera nomo kaj adreso,

eventuale kun la kongresnumero kaj U.E.A. membromarko. Sur la koverto oni skribu nur la pseŭdonimon kaj la branĉo(j)n prenata(j)n.

(3) Nevalidaj por la Konkurso estas verkoj aperintaj en presa formo. Ĉiu konkursanto konsentas, ke la rajto pri unua presigo de premiita verko apartenas al U.E.A., kaj devigas sin ne publikigi ĝin aliloke, krom se U.E.A. rifuzas la presigon. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro.

(4) La tradukaĵoj kopirajtaj devas esti akompanataj de skriba konsento de la posedanto de la kopirajto. U.E.A. ne konsentas pagi tantiemon, se la aŭtoro tion postulas.

(5) La konkursantoj devas liveri al la peranto de B.K. po 4 kopioj de ĉiu el la konkursaĵoj. Ĉe tradukoj oni devas aldoni la saman nombron de la originala teksto. La tuta konkursa materialo devas atingi la peranton plej malfrue la 31-an de marto.

(6) La peranto gardas antaŭ la juĝantoj la identecon de la konkursantoj. Li sendas po unu kompleto da konkursaĵoj al ĉiu juĝanto en la koncerna branĉo, kaj post la finpretigo de la juĝoj li konigas al la sekretario la nomojn kaj adresojn de la partoprenantoj.

Art. 3

(1) La prijuĝa komisiono konsistas el konstanta sekretario de B.K., el kvar pliaj membroj kaj el du anstataŭantoj. La konstantan sekretarion nomas la Estraro de U.E.A. por la daŭro de 3 jaroj, sed li povas esti eksigita de sia ofico ankaŭ pli frue, se la Estraro opinias tion oportuna. La membrojn de la komisiono kaj iliajn anstataŭantojn nomas la Estraro de U.E.A., post interkonsiliĝo kun la konstanta sekretario, plej malfrue la 31-an de dec. por ĉiu el la sekvaj konkursoj.

Se la juĝa tasko en iu sekcio estas tro peza, la sekretario rajtas dividi la prijuĝon de la poezia kaj proza fakoj inter la komisionanoj. Tamen pli malmultaj ol 3 membroj de unu fako aŭ branĉo ne rajtas decidi pri la konkursaĵoj.

(2) La Komisiono laboras skribe. Ĉiu membro de la Komisiono notas sur ĉiu konkursaĵo la poentojn, kiujn ĝi meritas laŭ lia opinio. La poentoj estas de 0 ĝis 20, tiel, ke la plej bona klasifiko estas 20 kaj la plej malbona 0. La tiel klasifikitajn konkursaĵojn ĉiu membro resendas al

la peranto plej malfrue ĝis la 31-a de majo. La konstanta sekretario adicias la poentojn de la unuopaj konkursaĵoj kaj laŭ la nombro de la ricevitaj poentoj en ĉiu branĉo li konstatas, kiuj konkursaĵoj estis laŭvice la plej bonaj. La konstanta sekretario informas plej malfrue ĝis la 15-a de julio la premiitojn de ĉiu konkursa branĉo pri la rezulto.

(3) La juĝantaro povas difini malpli ol tri premiojn en iu branĉo. Se ĝi donas en iu branĉo nur du premiojn aŭ nur unu, ĝi decidas, ĉu la premioj estas de unua aŭ dua, resp. tria merito. Premimono ne uzita en iu branĉo povas esti aldonata al alia branĉo.

(4) La juĝa komisiono povas forigi iun branĉon kiel neutilan aŭ jam plene funkciintan.

(5) La-membroj de la Komisiono kaj iliaj anstataŭantoj devas aparteni al minimume 5 diversaj nacioj. Ili ne rajtas konkursi, almenaŭ ne en tiuj branĉoj, kiujn ili prijuĝas.

Art. 4

(1) La gajnintoj legas aŭ legigas la premiitajn verkojn dum aparta kongresa aranĝo, dediĉita al Belarta Konkurso. Tiun aranĝon prezidas la konstanta sekretario de la Belartaj Konkursoj aŭ unu el la membroj de la Komisiono. La aliaj membroj, kiuj ĉeestas la kongreson, troviĝas en la prezidantaro.

(2) La teatraĵetoj povas esti ludataj aŭ legataj. Se temas pri aliaj branĉoj, oni okazigas ekspozicion de la premiitaj verkoj, aŭ alian aranĝon laŭ la karaktero de la koncerna arta branĉo.

(3) En la komenco de la aranĝo la prezidanto solene proklamas la premiitajn verkojn kaj la nomojn de la gajnintoj. Al la gajnintoj li disdonas por ĉiu premiita verko skriban ateston kaj libron — aŭ aliajn premiojn laŭ la decido de la Estraro de U.E.A.

(4) Laŭ ebleco la premiitaj verkoj estos publikigitaj aŭ reproduktitaj en "ESPERANTO".

(5) Ĉiuj artamantoj havas la eblecon donaci apartajn premiojn por unu aŭ pluraj gajnintoj de unu aŭ pluraj konkursaj branĉoj. Tiuj premioj ricevas la nomon laŭ la persono, kiu donacas la premion. Pri allaso de tiuj premioj decidas la Estraro de U.E.A.

STATUTO DE TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO (TEJO)

I. ĜENERALAJ PRINCIPOJ

Art. 1. Nomo

La nomo de la Organizo estas Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO).

Art. 2. Aparteno al alia Organizaĵo

La Organizo estas la Junulara Sekcio de Universala Esperanto-Asocio (UEA).

Art. 3. Konsisto

La Organizo konsistas el landaj junularaj asocioj, provincaj junularaj ligoj, lokaj junularaj grupoj kaj individuaj membroj. La suborganizaĵoj estas nomataj sekcioj.

Art. 4. Celoj

La Organizo celas plifortigi la interkompreniĝon kaj la amikecon inter la tutmonda junularo pere de :

1. disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto inter la junularo,
2. enkonduko de la Internacia Lingvo Esperanto en la lernejojn,
3. praktika utiligo de la Internacia Lingvo Esperanto je la servo de la junularo,
4. okazigo de internaciaj junularaj kunvenoj.

Art. 5. Neŭtraleco

La Organizo estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj. Ĝi rilatas al ĉiuj organizaĵoj, kiuj celas plifortigi la interkompreniĝon kaj la amikecon inter la tutmonda junularo.

Art. 6. Lingvo

La oficiala lingvo estas la Internacia Lingvo Esperanto, tia kia ĝi estas difinita per sia fundamento kaj per sia verkaro.

Art. 7. Sidejo kaj Administrejo

1. La sidejo de la Organizo estas la sidejo de UEA.
2. La administrejo estas ĉe la Ĝenerala Sekretario.

Art. 8. Administra Jaro

La administra jaro estas la kalendara jaro.

II. MEMBRECO

Art. 9. Membro-kategorioj

La Organizo havas aktivajn kaj honorajn membrojn.

Art. 10. Aktivaj Membroj

1. Aktivaj membroj estas:
 - a. asociaj membroj, are aligitaj de la aligitaj sekcioj,
 - b. individuaj membroj, individue enlistigitaj de la Organizo.
2. Aktivaj membroj estas junaj Esperantistoj havantaj malpli ol 25 jarojn. Funkciuloj de la Organizo kaj de ĝiaj sekcioj povas esti pli aĝaj.
3. Ĉiuj asociaj kaj individuaj membroj de UEA havantaj malpli ol 25 jarojn apartenas aŭtomate al la Organizo.

Art. 11. Honoraj Membroj

Honoraj membroj povas esti nomataj Esperantistoj aŭ aliaj personoj, kiuj faris gravajn servojn al la Esperantista junulara movado.

Art. 12. Akcepto de Membroj

1. Landa junulara asocio, provinca junulara ligo aŭ loka junulara grupo en lando sen landa junulara asocio, povas aliĝi al la Organizo, se ĝi estas laŭorde organizita kaj se

ĝi estas neŭtrala laŭ art. 5 de tiu ĉi statuto. Pri la akcepto decidas la Komitato. Sekcio pagas por ĉiuj siaj membroj, kiuj ne estas individuaj membroj de la Organizo, kotizon fiksitajn de la Komitatoj de UEA kaj de TEJO.

2. Individua membro estas akceptata laŭ la kondiĉoj de la Statuto kaj Ĝenerala Regularo de UEA.

3. Honora membro estas nomata de la Komitato laŭ propono de la Estraro aŭ de landa sekcio.

Art. 13. Eksiĝo

1. La eksigo devas esti deklarita skribe. Ĉe aktivaj membroj ĝi validas je la fino de la administra jaro, ĉe aliaj membroj je ĉiu ajn dato.

2. Membro aŭ sekcio, kiu dum la kuranta administra jaro malgraŭ averto ne pagis la koncernan kotizon, estas konsiderata kiel eksciĝinta.

Art. 14. Eksigo

Membro aŭ sekcio, kiu evidente kontraŭlaboras la celojn de la Organizo aŭ ne kontentige plenumas siajn devojn al la Organizo, povas esti eksigata. Kompetenta pri la eksigo estas la Arbitracia Tribunalo.

III. AMIKOJ DE LA ESPERANTISTA JUNULARO

Art. 15. Subtenantoj

1. Amikoj de la Esperantista Junularo estas personoj kaj organizaĵoj, kiuj finance subtenas la Organizon. Ili havas konsultan voĉon en la Organizo.

2. La minimuma kotizo por la subtenantoj estas fiksitaj de la Komitato.

IV. ALIAJ ORGANIZAJOJ

Art. 16. Kontraktoj kun Fakaj Asocioj

Kun internacia faka junulara asocio Esperantista la Organizo povas fari kontrakton pri komuna agado, interŝanĝo de servoj ktp. La Estraro estas rajtigita fari kun ĝi kontrakton pri speciala kotizo. La Komitato devas aprobi la kontrakton.

V. ORGANOJ

Art. 17. Organoj

La Organoj de la Organizo estas la Komitato, la Estraro, la Junularaj Delegitoj, la Revizoroj, kaj la Arbitracia Tribunalo.

Art. 18. Komitato

1. La supera organo de la Organizo — escepte de la regulo de art. 23 — estas la Komitato, kiu estas elektata ĉiun duan jaron.

2. Ĉiu aliĝinta landa sekcio, provinca aŭ loka sekcio en lando sen landa sekcio, kun 15 ĝis 200 membroj elektas unu Komitatanon kaj unu plian por ĉiu komencita ducento. La nombro de la Komitatoj de ĉiu sekcio restas sen ŝanĝo dum la oficperiodo, sed sekcio, kiu aliĝas aŭ atingas plian ducenton, elektas Komitatanon aŭ Komitatojn por la resto de la periodo. Eksiĝintaj kaj mortintaj Komitatoj povas esti anstataŭataj. Por la membro-nombro validas la ciferoj de la 31-a de decembro de la antaŭa administra jaro.

3. Ĉiu aliĝinta faka asocio elektas unu Komitatanon.

4. Komitatano, kiu ne povas partopreni Komitatkunsidon, devas nomi anstataŭanton, skribe aprobotan de la koncerna sekcio aŭ faka asocio. Tiu anstataŭanto havas dum la koncerna kunsido la samajn rajtojn kiel ĉiu alia Komitatano.

5. La Komitato :

- a. elektas inter siaj membroj Prezidanton, unu aŭ du Vicprezidantojn, Ĝeneralan Sekretarion, Kasiston, Redaktoron de la oficiala bulteno "La Juna Vivo" kaj laŭ neceso pliajn membrojn de la Estraro;
- b. elektas du revizorojn;
- c. elektas la kvin membrojn de la Arbitracia Tribunalo;
- ĉ. rajtas nomi honorajn membrojn;
- d. difinas la ĝeneralan agadon de la Organizo;
- e. decidas pri la aliĝo de sekcioj kaj fakaj asocioj;
- f. decidas pri la regularoj;
- g. fiksas la membrotizojn kaj aprobas la jarbilancon kaj la buĝeton;
- ĝ. decidas pri la agado de la Estraro;

- h. decidas pri la tempo kaj la loko de la Internacia Junulara Kunveno kaj de aliaj kunvenoj;
- ĥ. decidas pri la aferoj ne-rezervitaj al aliaj organoj.

Art. 19. Estraro

1. La Estraro konsistas el la membroj difinitaj en art. 18 a kaj estas elektata ĉiun jaron.

2. La Estraro :

- a. plenumas la decidojn de la Komitato,
 - b. kreas novajn servojn kaj aranĝojn,
 - c. respondecas pri la financoj de la Organizo kaj prezentas al la Komitato la jarbilancon kaj proponon pri buĝeto.
3. La Prezidanto reprezentas la Organizon kaj subskribas kun la Ĝenerala Sekretario la ĉefajn dokumentojn. Li prezidas la Komitaton, la Estraron kaj la kunvenojn de la Organizo.

4. La Vicprezidantoj laŭnecese anstataŭas la Prezidanton.

5. La Ĝenerala Sekretario zorgas pri la efektivigo de la decidoj de la Komitato kaj de la Estraro, kunmetas la jaran raporton pri la laboro de la Organizo, ellaboras la planon de la laboro por la estonta jaro kaj gvidas la eksterajn rilatojn de la Organizo.

6. La Kasisto administras ĉiujn monaferojn de la Organizo kaj kunmetas la jarbilancon kaj proponon de buĝeto.

7. La Redaktoro redaktas la oficialan bultenon "La Juna Vivo" laŭ la gvidlinioj fiksataj de la Komitato kaj prizorgas la mondan informadon pri la Esperantista junulara movado.

8. La ceteraj Estraranoj gvidas la konstantajn servojn de la Organizo.

Art. 20. Specialaj Komisionoj

En la kadro de sia kompetenteco la Komitato aŭ la Estraro povas elekti inter aŭ ekster si specialajn komisionojn aŭ unuopulojn por esplori iujn problemojn aŭ por plenumi difinitajn administrajn taskojn. Post la plenumo de sia tasko ĉiu komisiono devas skribe raporti al la elektinta organo.

Art. 21. Junularaj Delegitoj

1. En ĉiu loko la Organizo povas esti reprezentata de Junulara Delegito, kiu estas juna esperantisto havanta minimume 18 jarojn kaj kiu estas elektata de loka sekcio aŭ nomata de landa sekcio, interkonsente kun la ĉefdelegito de UEA.

2. Rilate al la oficaŭro kaj la plenumo de la servoj, kiuj estas speciale porjunularaj, validas la reguloj pri delegitoj en la Generala Regularo de UEA.

Art. 22. Revizoroj

La Revizoroj, kiuj devas esti fakuloj pri financaj aferoj kaj kiuj estas elektataj ĉiun duan jaron, ekzamenas ĉiujare la librotenadon, la plenumon de la buĝeto kaj la jarbilancon. Ili raportas skribe al la Komitato.

Art. 23. Arbitracia Tribunalo

1. La Arbitracia Tribunalo konsistas el kvin membroj, kiuj estas elektataj ĉiun duan jaron. Ili elektas inter si prezidanton kaj vicprezidanton. Komitatano de la Organizo ne rajtas aparteni al la Arbitracia Tribunalo.

2. La Arbitracia Tribunalo decidas pri ĉiuj konfliktoj inter membroj, sekcioj kaj organoj de la Organizo.

3. Ĉiu membro, sekcio kaj organo havas la rajton de plendo ĉe la prezidanto de la Arbitracia Tribunalo, kiu informas la kulpigiton pri la plendo. La kulpigito devas sendi sian defendon en tempolimo de 30 tagoj post ricevo de tiu sciigo. Post esploro de la afero ĉe la partioj kaj, laŭbezono, ĉe aliaj membroj, sekcioj aŭ organoj de la Organizo, la Arbitracia Tribunalo faras sian decidon, kiu estas definitiva.

4. Se esploro necesigas grandan korespondadon, longan laboron aŭ gravajn elspezojn, la Arbitracia Tribunalo rajtas postuli de la partioj la kostojn de la proceduro. Escepte de la Komitato kaj de la Estraro, plendanto devas antaŭpagi certan sumon fiksitan de la Arbitracia Tribunalo.

Art. 24. Labormaniero de la Organoj

1. La Komitato kaj la Estraro kunvenas okaze de la Internacia Junulara Kunveno; krom tio la Estraro povas kunveni laŭ bezono.

2. En voĉdonoj validas la plimulto de la voĉdonintoj; okaze de voĉegaleco decidas la prezidanto de la koncerna organo. Decidoj, kiujn partoprenis malpli ol la duono de la rajtanoj, devas poste esti submetataj al skriba voĉdono, en kiu sufiĉas la plimulto de la voĉdonintoj. Funkciulo sin detenas de voĉdono pri aferoj, kiuj koncernas lin persone.

3. Por kovri la administrajn elspezojn de la Estraranoj, de la Revizoroj kaj de la Komisionoj, la Komitato asignas certan sumon en la buĝeto.

VI. INTERNACIA JUNULARA KUNVENO

Art. 25. Celo

1. La Internacia Junulara Kunveno (IJK) estas internacia manifestacio de la junaj Esperantistoj kaj celas plifortigi la interkompreniĝon kaj la amikecon inter la tutmonda junularo.

2. La organizo de la IJK estas fiksita de la Komitato en la Kunvena Regularo.

VII. FINANCOJ

Art. 26. Enspezoj

La enspezoj de la Organizo estas :

- a. membrokotizoj,
- b. monprofitoj de aktivecoj de la Organizo,
- c. mondonacoj kaj subvencioj.

VIII. GENERALA VOĈDONO

Art. 27. Okazigo

1. Generala Voĉdono okazas,
 - a. se la Komitato aŭ, okaze de urĝeco, la Estraro ĝin decidas;

b. se sekcioj reprezentantaj kvaronon de la membraro ĝin postulas per sia subskribo, en tempolimo de tri monatoj, kalkulita de la unua ĝis la lasta subskribo.

2. La Ĝenerala Sekretario ĝin aranĝas plej malfrue du monatojn post ricevo de sufiĉa nombro da subskriboj. Je propono pri statutŝanĝo okazas voĉdono pri ĉiu paragrafo.

3. Tiu voĉdono povas nuligi ĉiujn elektojn kaj decidojn, ŝanĝi la Statuton kaj dissolvi la Organizon; krome ĝi povas esprimi sin pri demandoj submetitaj de la Komitato.

Art. 28. Kalkulo de Voĉoj

1. Ĉiu sekcio havas nombron de voĉoj egalan al la nombro de siaj membroj. Por voĉdono validas la nombro de la membroj, por kiuj la sekcio pagis en la administra jaro antaŭ la voĉdono. Por novaliĝinta sekcio validas la nombro, por kiu ĝi jam pagis.

2. En lando, kie ne ekzistas sekcio, la membroj voĉdonas individue.

3. En voĉdono validas la plimulto de la voĉoj esprimitaj. Por ŝanĝi la Statuton aŭ dissolvi la Organizon necesas du trionoj de la esprimitaj voĉoj, kondiĉe ke tiuj voĉoj reprezentu minimume duonon de la membraro.

Art. 29. Kontrolo

La ĝenerala voĉdono estas skriba, kaj la voĉoj estas kalkulataj 90 tagojn post la forsendo de la voĉdoniloj. La voĉdonilojn kontrolas tri membroj nomitaj de la Komitato. Tiuj membroj skribe certigas la korektecon de la procedo.

IV. DISSOLVO

Art. 30. Utiligo de la Havaĵo

En okaze de dissolvo de la Organizo la restanta havaĵo estas donacata al alia Esperanto-organizaĵo, kiun indikas la decido pri dissolviĝo.

BAZA LABORPROGRAMO DE U.E.A.

(Akceptita de la Komitato en Bologna, 1955)

I. ENKONDUKAJ VORTOJ

La decidoj de UNESKO signifas unuarangan rekonon de ĉiuj niaj atingoj. Ili markas komenciĝon de esence nova etapo: tiu de la oficiala rekono. Por vaste utiligi tiun akiritan pozicion estas necese plani ĉiujn aktivecojn de la Asocio por la sekvantaj jaroj ekstere kaj interne. Ĉiu limigo al nur unu aŭ kelkaj branĉoj povus, eble, doni iajn rezultojn en la elektitaj sferoj, sed ne havus grandan valoron por la tuto, nome por la ĝenerala, tre vasta progresigo de la Internacia Lingvo. En la nuna situacio de la mondo, precipe konsiderante la staton de spiritoj postulantaj ĉiam pli kaj pli internacian kompreniĝon kaj kooperadon por eviti katastrofon de la homaro, post la agnosko de UNESKO pri la valoroj atingitaj per Esperanto, la Asocio kaj la Movado ĝenerale tute certe povas atingi konsiderindajn rezultojn, se ĝi agos laŭplane, metode kaj konkorde. Jen la ĉefaj taskoj, kiuj altrudiĝas:

II. EKSTERAJ TASKOJ

1) **Unesko kaj UN.** Plifortigi la rilatojn precipe per efika kunlaboro pri punktoj komunaj laŭ speciala plano.

2) **Eŭropa Konsilantaro.** Havigo de konsulta pozicio; efektiva kunlaboro por solvo de la lingva problemo en Eŭropo; ĝemeligo de urboj per Esperanto; internaciaj kursoj pri eŭropaj problemoj sub aŭspicioj de E.K.; laŭ ebleco eksperimentaj kursoj en diverslandaj lernejoj kun la fina celo enkonduko de E. en la lernejojn.

3) **Internacia Konvencio.** Paralele kun la klopodoj sub 2) fari en konvena tempo similan klopodon en monda kadro por subskribo de Internacia Konvencio pri enkonduko de E. en la lernejojn. Tiucele iniciati diplomaciajn kontaktojn inter la landoj plej maturaj por tia Konvencio.

4) **Azio kaj Afriko.** Vasta informala laboro sur tiuj du kontinentoj (dujara vojaĝo de komitatano Sekelj; artikoloj kaj kursoj fare de la ekspedicio Sekelj; fondo de societoj

kaj asocioj en ĉiuj landoj, vizitotaj de la ekspedicio Sekelj; livero de artikoloj al gazetoj kaj revuoj de tiuj landoj fare de la Informa Fakoj; ekspozicioj organizataj de la Informa Fakoj; bulteno de la IGS en angla kaj franca lingvo por la gazetoj kaj revuoj de tiuj landoj).

5) **Aliaj landoj.** Plifortigo de la informa laboro en ĉiuj landoj, sed tute speciale en tiuj landoj de Suda Ameriko, en kiuj praktike nia Movado ne ekzistas. Tiucele fortikiĝi la jam ekzistantajn landajn asociojn kaj fondi novajn kun la helpo de la jam ekzistantaj. Okazigo de unu el la sekvantaj UK en Suda Ameriko kaj de alia, depende de la progreso en Azio, en unu el la aziaj landoj.

6) **Edukado, scienco kaj kulturo.** Nepre plifortigi la poziciojn de Esperanto en tiuj medioj en ĉiuj landoj. Tiucele specialan atenton dediĉi al informa laboro inter universitataj profesoroj kaj sciencistoj, geinstruistaj asocioj, studentoj. Por helpi la celon sub 4) organizi informan laboron, disdonadon de lernolibroj kaj okazigon de kursoj speciale inter la studentoj el landoj de Azio kaj Afriko, kiuj troviĝas en la eŭropaj universitatoj, precipe Parizo, Londono, Amsterdamo.

7) **Fakaj kongresoj kaj konferencoj.** Iom post iom enkonduki Esperanton en la fakajn internaciajn kongresojn kaj konferencojn. Atingi tiun celon per

- a) atentigado pri la valoro de Esperanto,
- b) persona partopreno de esperantistoj-fakuloj en la kongresoj kaj konferencoj.

8) **Leksikonoj kaj enciklopedioj.** Prizorgi taŭgajn artikolojn de diversaj longecoj pri E., Zamenhof kaj la problemoj de komuna lingvo por ĉiuj leksikonoj kaj enciklopedioj.

III. INTERNAJ TASKOJ

1) UEA.

- a) Aligi al la Asocio ĉiujn ekzistantajn landajn fakajn asociojn;
- b) iniciati kaj helpi la organizon de novaj landaj fakaj asocioj;
- c) ligi al la Asocio la milojn kaj milojn da personoj, kiuj apogas la celojn de la Esperanto-Movado, plej taŭge en formo de apogantoj;

- d) grave altigi la nombron de individuaj membroj per speciala tiucela kampanjo en ĉiuj landoj de la mondo;
- e) vendi la domon en Herongate, havigi al la Asocio taŭgan oficejon (kun biblioteko, konferencejo) en grava urbo kaj centriĝi en ĝi ĉiujn branĉojn de la Asocio;
- f) aŭ fakte funkciigi la Genevan Oficejon (tre dezirinde) aŭ nepre trovi iun alian solvon;
- g) kun la tempo funkciigi laŭ ebleco specialan informan oficejon por Azio en unu el la aziaj landoj;
- h) modernigo de la CO per nuntempaj oficejaj instrumentoj (diktafono ktp.) kaj precipe per malgranda moderna presejo por publikigo de diversaj propagandiloj kaj bultenoj;
- i) nepre konservi CED kiel specialan sciencajn institucion de la Movado kaj ne miksi ĝin kun la aliaj aktivecoj, speciale ne kun la branĉo informado (pri la laboro kaj plano de CED vidu specialan raporton).

2) Informado.

- a) larĝigo de la Informa Fakoj surbaze de la akiritaj spertoj;
- b) eldonado de la bulteno de la IGS plue en Esperanto, sed krome en la angla kaj franca lingvoj por sendo rekte al la gazetoj kaj revuoj de landoj, en kiuj ne ekzistas landaj informaj fakoj;
- c) utiligo de la materialoj de la Unua Universala Ekspozicio de Esperanto por okazigo de similaj ekspozicioj en diversaj landoj (ellabori detalan planon, tiel ke la ekspozicia materialo estu senĉese utiligata kaj neniam, krom dum la transporto, troviĝu en kestoj);
- d) eldono de specialaj flugfolioj kaj prospektoj en pluraj lingvoj, precipe por la neesperantistaj kongresoj;
- e) traduko kaj publikigo en naciaj lingvoj de artikoloj, studoj kaj verkoj havantaj informan karakteron;
- f) konstanta rubriko en Heroldo aŭ alia gazeto sub la titolo "Defendo de la lingvo Esperanto";
- g) konsiloj al la landaj informaj fakoj pri plibonigo de informado kaj fondo de novaj informaj fakoj;
- h) plilarĝigo de laboro de la informaj fakoj al organizado de bonaj ekspozicioj, publikaj prelegoj, prelegoj en lernejoj, prelegoj per radio kaj aliaj metodoj de informado laŭ specialaj instrukcioj;

- i) konstanta, ĉiujara kontrolado pri la informa laboro en mondaj kadroj koncerne la kvanton kaj kvaliton;
- j) regulaj kunvenoj de la reprezentantoj de la landaj informaj fakoj dum la U.K. aŭ aliloke por diskuti la pluaĵn aktivecojn.

3) **Kursoj.** Multe plibonigi la nivelon de la lingvo-instruado per :

- a) organizo de internaciaj kursoj por la kursgvidantoj;
- b) internaciaj diplomoj por Esperanto-instruistoj laŭ tre alta kriterio;
- c) fondo de faka asocio de Esperanto-instruistoj, aŭ speciala branĉo en la kadro de ILEI;
- d) kontrolo de lernolibroj kaj rigora kritiko pri lernolibroj kaj vortaroj, kiuj deformas la lingvon;
- e) verkado de lernolibroj, aŭ instigado al tia verkado, por la popoloj de Azio kaj Afriko;
- f) apogo al internaciaj kursoj aranĝataj de D-rino Peter Ruetschi kaj konsiderinda larĝigo de tiuj kursoj al aziaj popoloj;
- g) specialaj, altnivelaj kursoj en instruistaj lernejoj, seminarioj, asocioj;
- h) kursoj en lernejoj kaj internacia kunligo de la geinstruistoj kaj gelernantoj (nepre prizorgi la ligojn al la Movado de la lernantoj, kiuj finas tiujn kursojn, ĉar la ĝisnunaj spertoj tiurilate montras minimumajn rezultojn);
- i) kontrolado de la progreso sur la kampo de instruado per statistikoj, enketoj kaj aliaj metodoj, kaj konstanta interkonsiliĝo por plua progresigo; por atingo de tiuj celoj firme kunlabori kun la Akademio kaj la Internacia Esperanto Instituto.

4) **Kulturaj problemoj.**

- a) ĝenerala altigo de la kultura nivelo de la grupoj kaj societoj (interŝanĝo de prelegoj utiligante por tiu celo parte ankaŭ elektromagnetajn bendojn, teatrajn trupojn, vivajn gazetojn, lumbildojn kaj filmojn, prelegvojaĝojn);
- b) klopodoj rilate la enhavan plibonigon de la tuta Esperanto-gazetaro;
- c) kreo de literatura revuo aŭ helpo al privata iniciato

(senpaga reklamado kaj morala helpo) rilate la fondon kaj evoluon de tia revuo;

- d) fondo, en kunlaboro kun ILEI, de pedagogia revuo aŭ helpo por fondi tian revuon;
- e) larĝigo kaj plioftigo de Scienca Revuo en kunlaboro kun ISAE;
- f) laŭ ebleco fondo de sociologia revuo aŭ utiligo de la Scienca Revuo, post ĝia pligrandigo kaj plioftigo, por publikigo de sociologiaj studoj;
- g) multe pli granda helpo al ĉiuj fakaj asocioj, sed speciale al la geinstruista, scienca, ĵurnalista, fervojista, medicina kaj al sociologia komisiono (laŭ ebleco atingi, ke la fakaj asocioj aliĝu al UEA laŭ la kondiĉoj de la landaj asocioj, tiel ke ili estu reprezentitaj en la Komitato);
- h) instigo al fondo de novaj fakaj asocioj;
- i) konsiderinda larĝigo de la reto de fakaj delegitoj, precipe por la plej gravaj fakoj rilatantaj al ĉiuj branĉoj de edukado, scienco kaj kulturo;
- j) instigo al fondo de novaj grupoj en lokoj, kie ili ankoraŭ ne ekzistas, aŭ en grandaj urboj, en kiuj ekzistas nur unu grupo (la spertoj montras, ke eĉ en grandegaj urboj niaj grupoj ne povas transpasi la nombron de 300 membroj, kio necesigas la fondon, en tiaj urboj, de novaj grupoj ĉu laŭ vidpunkto teritoria, ĉu laŭ vidpunkto profesia aŭ faka : studentaj, laboristaj, intelektulaj aŭ similaj grupoj);
- k) fondo de Eldona fakoj de U.E.A. por publikigo de literaturaj kaj popularsciencaj verkoj.

(RIMARKO : La Baza Laborprogramo estis ellaborita de la Ĝenerala Sekretario kaj akceptita de la Komitato en 1955. Multaj punktoj estas jam realigitaj, aliaj nuntempe (1959) efektivigataj. Ĝi prezentas la komunan framon por la agado de ĉiuj organoj de U.E.A., de la aliĝintaj asocioj, de la kunlaborantaj fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj, de la lokaj societoj kaj de la unuopuloj).

FUNDAMENTA PRINCIPARO DE INFORMADO PRI LA INTERNACIA LINGVO

(Akceptita en la kunveno de la reprezentantoj de la Informaj Fakoj en Frostavallen, Svedujo, la 30-an de Julio 1956).

I. Celo

1. **Tri branĉoj de aktivecoj: informado; instruado; praktika utiligo.** Nur paralela, bone studita kaj celkonscia agado sur la tri kampoj povas doni kontentigajn rezultojn kun daŭra valoro.
2. **La celo de la informado:** a) diskonigi la Internacian Lingvon kaj ĉion kio estas kreita en ĝi aŭ pere de ĝi; b) detruai la antaŭjuĝojn, precipe en la ŝlosilaj pozicioj de la kulturo kaj de la publika vivo; c) instigi al lernado de la lingvo kaj altiri novajn adeptojn al la movado.

II. Nuna Stato

3. **Fondiĝo:** UEA refondis sian prop. fakon en Bourne-mouth (1949), transformis ĝin en Informan Fakon (I.F.) en Parizo (1950) kun Gazetara Servo (1950) kaj Kongresa Gazetara Servo (1950). Sekvis reorganizado aŭ organizado de la landaj informaj fakoj.
4. **Rezultoj:** Ĉiujare, krom por 1954, estis publikigataj la rezultoj de informado en mondaj kadroj en "Esperanto" (la rezultoj por la jaro 1957 estas publikigitaj en la jul/aŭg. numero de "Esperanto"). Ili montras kontentigan progreson, sed ankaŭ bezonon pri plua ampleksigo kaj kvalita plibonigo.

III. Organizo

5. **Informa Fakoj de UEA** (gvidata de la Ĝenerala Sekretario):
 - a) **Gazetara Servo:** 1) Bulteno kun novaĵoj (en Esperanto por la landaj I.F.; en la angla kaj franca por la grandaj presagentejoj kaj por la ĉefaj gazetoj en

- landoj sen movado); 2) Fotoservo; 3) Artikola Servo; 4) Radio-Servo; 5) se eble, Televida Servo.
- b) **Kongresa Gazetara Servo:** 1) Bulteno kun novaĵoj en Esperanto kaj nacilingve; 2) Fotoservo; 3) Artikola Servo; 4) Radio-Servo; 5) se eble, Televida Servo.
- c) **Ekspozicioj:** 1) Organizado de la Universala Ekspozicio en diversaj landoj kaj konstanta kompletigado de la materialoj; 2) Sugestoj rilate organizon de aliaj ekspozicioj laŭ la modelo de la universala.
- d) **Afiŝoj kaj flugfolioj:** Prizorgado de tekstoj kaj taŭgaj desegnaĵoj; eventuale eldonado en diversaj okazoj kun internacia karaktero.
- e) **Filmoj, Radio, Televido:** Sugestoj al landaj I.F. pri utiligo de tiuj rimedoj.
- f) **Prelegvojaĝoj:** Organizo pere de la landaj asocioj kaj vasta utiligo por informado pere de gazetoj, radio, afiŝoj k.s. laŭ la cirkonstancoj.
- g) **Gazetaraj Konferencoj:** Utiligo de ĉiu pli grava evento por aranĝo de gazetaraj konferencoj.
6. **Landaj I.F.** (gvidataj de malgranda komitato aŭ de komisiito): Organizi la samajn branĉojn laŭ la modelo de la I.F. de UEA.
7. **Lokaj I.F.** (gvidataj de komisiito aŭ malgranda komitato): Organizo laŭ la modelo de la landa I.F. kun adapto al la lokaj cirkonstancoj.

IV. Funkcioj

8. **I.F. de UEA:** a) Harmoniigo de la tuta laboro; b) rekta informado al internaciaj instancoj kaj en regionoj sen movado; c) konsiloj kaj helpo per liverado de informoj, artikoloj kaj materialoj al la landaj I.F. kaj al la rektaj kunlaborantoj en landoj sen movado.
9. **Landaj I.F.:** a) realigo de la sugestoj de la I.F. de UEA; b) organizo de la informado sur siaj teritorioj; rekta informado al tutlandaj instancoj; d) konsiloj kaj helpo al la lokaj I.F. per liverado de artikoloj, novaĵoj, flugfolioj, afiŝoj kaj aliaj materialoj.
10. **Lokaj I.F.:** a) Realigo de la konsiloj de la landaj I.F.; b) rekta informado al la loka kaj regiona publiko.

V. Metodoj

11. **Diversaj eblecoj** : a) Artikoloj; b) Mallongaj informoj (nepre objektivaj); c) Publikaj prelegoj por ĝenerala publiko; d) Prelegoj en specialaj medioj (sciencaj institucioj, literaturaj societoj, sindikatoj, studentaj kluboj, diversaj asocioj ktp.); e) Radioprelegoj kaj informoj; f) Afiŝoj; g) Flugfolioj; h) sloganoj; i) ekspozicioj; j) filmoj; k) varbado de Apogantoj de UEA; l) aliaj eblecoj laŭ la landaj aŭ lokaj cirkonstancoj.
12. **Nur intensa utiligado de ĉiuj eblecoj paralele efikas pozitive.**

VI. Kvalito

13. **Ĉefaj eraroj** : a) Nomi la lingvon artefarita, helpa, verda k.s.; oni ĉiam nomu ĝin aŭ **La Internacia Lingvo** aŭ **Esperanto**;
b) superflue menciadi diversajn projektojn de komuna lingvo;
c) ne distingi nete inter Esperanto kiel vivanta lingvo kaj tiuj projektoj, se la cirkonstancoj devigas paroli pri ili;
d) uzi en nacilingvaj tekstoj esperantajn esprimojn, ekz. "samideano", "Majstro", "verdstelanoj" k.s.;
e) skribi pri Esperanto en nekorekta nacia lingvo;
f) nomadi la informadon pri Esperanto "propagando";
g) doni al la Esperanto-Movado sektecan karakteron (tro multe da steloj kaj flagoj, kantado de la himno kaj aliaj kantoj en nekonvenaj tempo kaj loko, strangaĵoj en la vestoj dum kongresoj kaj aliaj publikaj kunvenoj k.s.). **La eraroj en la informado malproksimigas de Esperanto dekmilojn da personoj kaj kaŭzis fortan kompromitiĝon de la movado en multaj medioj.**
14. Por altigi la kvaliton estas necese akcenti ĉion, kio montras la kulturan kaj praktikan valorojn de la lingvo : literaturo, sciencaj verkoj, ISU, Belartaj konkursoj, delegita reto, precipe helpo dum vojaĝoj kaj en profesia laboro. **La digno de ĉiuj publikaj aranĝoj respegulu la respekton, kiun la esperantistoj mem havas por la Internacia Lingvo.**

VII. Konstanteco kaj Kampanjoj

15. **Konstanteco** : La Informado devas esti konstanta dum la jaro, por ke la publiko senĉese konsciu pri la ekzistado kaj funkciado de Esperanto.
16. **Kampanjoj** : Specialaj kampanjoj, kun utiligo de ĉiuj metodoj, devas esti farataj antaŭ la komenco de la kursoj, okaze de kongresoj, je la Zamenhof-tago kaj ĉiam kiam por tio prezentigos taŭga okazo.
17. **Sepdekjara datreveno de Esperanto** : En 1957 prezentigos taŭga okazo por grandstila monda kampanjo dum unu monato, fiksota interkonsente.
18. **Centjara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof** : La 15-a de decembro 1959 devos esti solene festata en la tuta mondo kaj la preparlaboroj por tiu manifestacio devos komenciĝi almenaŭ unu jaron pli frue.

VIII. Medioj atingotaj

19. **Ĝenerala Informado** : Ĝi estas direktita al la larĝa publiko kaj havas la celon krei ĝeneralan favoran agordon.
20. **Speciala Informado** : Ĝi estas direktita al specialaj medioj, kies intereso transiras la limojn de iliaj naciaj lingvoj (sciencistoj, diversaj fakuloj, komercistoj, membroj kaj adeptoj de internaciaj organizaĵoj kaj movadoj) kun precipa atento al la junularo kaj al la studentoj.

IX. Konkludo

21. La esperantistoj mem estu pli forte konvinkitaj pri la praveco de la propra afero kaj pli kuraĝe argumentu kontraŭ la eraraj prezentoj. Ĉiu esperantisto konstante klopodu larĝigi kaj altigi sian lingvan scion. Ĉiu esperantisto ĉiam portu la Esperantan insignon (ne multajn, sed unu). En fakaj aŭ specialigitaj organizaĵoj la esperantistoj levu sian voĉon. La informado estu ĉiam adaptita al la medio, en kiu oni faras ĝin, kaj venu prefere de tiu medio mem.
22. Ĉiuj branĉoj de informado estu egale atentataj kaj

paralele aplikataj. La maniero de informado varias de unu lando al la alia kaj de unu medio al la alia. Sekve, tiuj ĉi bazaj principoj estu aplikataj kun elasteco kaj kun konsidero de la apartaj cirkonstancoj.

23. La tuta agado, paralela kaj harmonie kunordigita en la tuta mondo, havu daŭre la celon diskonigi la lingvon, instigi al lernado kaj praktika aplikado de Esperanto, venki la ŝlosilajn poziciojn en la kultura vivo kaj definitive favorigi la publikan opinion al Esperanto.

REGULARO PRI LA SERVO DE INFORMPETO AL U.E.A. DELEGITOJ

Fundamenta Principo : Ĉiu membro rajtas uzi la servojn de la Delegitoj. La servoj mem estas senpagaj, sed la uzanto devas repagi la elspezojn de la Delegito.

Oni rajtas peti informojn pri : Komerco, industrio, trafiko, laboro, dungo, salajroj, turismo, instruado, junulaj, studentaj kaj virinaj aferoj, k.t.p. Pri fakdemandoj oni skribu rekte al la Faka Delegito, se tia ekzistas.

Oni ne rajtas peti informojn pri : Komerca pagokapablo, morala indeco de persono (konfidencaj informoj). Tamen, tiukaze la Delegito rajtas interrilati kun loka agentejo, kiu sin okupas pri tio.

La Delegito rajtas rifuzi servojn, kies plenumon li juĝas kontraŭa al sia honoro aŭ konscienco.

Plendoj : Informpeto ne respondita de la Delegito normale 14 tagojn post ĝia ricevo, rajtigas la petinton plendi ĉe la Direktoro, kiu enketos. Oni ankaŭ plendu okaze de malbone farita servo.

Atentu : 1. Skribu tre legeble, precipe la adreson. Tiu ĉi estu skribita ĉiam en nacia lingvo kaj per latinaj literoj.

2. Skribu sur la adresflankon, post la nomo, la titolon Delegito de U.E.A., tiel ke, se la Delegito forestas, la letero estu transdonita al la Vicdelegito.

3. Aldonu post la subskribo la membromarkon por montri vian membrecon, kaj ripetu sur ĉiu sendaĵo la plenan adreson. Stampo kun adreso estas rekomendita.

4. Aldonu al la informpeto respondkuponon.

5. Skribu ĉiam en Esperanto, la oficiala lingvo de U.E.A. La uzo de nacia lingvo nuligas la rajton al plendo.

6. Afranku sufiĉe la korespondajon.

7. Ne forgesu, ke la delegiteco estas sensalajra ofico, kiun la Delegito akceptis por utili al Esperanto. Sekve faciligu lian taskon, ne ĝenante lin per petoj tute malgravaj.

Ĉi tiuj reguloj validas laŭsence ankaŭ por la rilatoj kun la oficejo de U.E.A.

Dum Vojaĝo: Ĉar la Delegito plej ofte ne disponas libere pri sia tempo, la membroj vojaĝantaj skribe informu la Delegiton pri sia vizito minimume unu semajnon antaŭe.

La Delegito havas la devon helpi la vojaĝanton. Sed oni memoru, ke ne estas la tasko de la Delegito atendi la fremdulojn en la stacidomoj, ilin akompani, fari komisiojn por ili, k.t.p.

* * *

Ne forgesu, ke post ricevo de informo aŭ helpo de delegito ordinara ĝentileco postulas, ke vi sendu al li dankesprimon aŭ minimume konfirmon ke vi bone ricevis la sendaĵon.

☆

☆

☆

LA ZAMENHOF-JARO

estas ankaŭ

LIBRO-JARO

Ĉiunonate aĉetu unu eldonafon, grandan aŭ malgrandan.

Komencu per

RETORIKO

de

IVO LAPENNA

Gia unua parto donas perfektan argumentadon pri la lingvoevoluo, utiliga al ĉiu esperantisto.

Eldono de la
Aŭtoro

Prezo: 11 gld.

44 st. bind.

9.- gld.

36 st. broŝ.

LIBROSERVO
DE U.E.A.



MALLONGIGOJ

uzataj en la Esperanto-Movado

A.E.A.	Aŭstralia Esperanto-Asocio.
A.E.F.	Aŭstria Esperantista Federacio.
A.E.L.	Argentina Esperanto-Ligo.
A.E.P.	Asocio de Esperantistoj en Pollando.
a.K.	antaŭ Kristo.
Ak.	Akademio.
anst.	anstataŭ.
A.O.	Administra Oficejo.
atm.	antaŭtagmeze.
B.E.A.	Brita Esperantista Asocio.
B.E.I.	Belga Esperanto-Instituto.
B.E.L.	Brazila Esperanto-Ligo.
b.t.	bonvolu turni.
bv.	bonvolu.
C.D.E.L.	Centra Dana Esperantista Ligo.
C.E.D.	Centro de Esploro kaj Dokumentado.
C.O.	Centra Oficejo.
ĉ.	ĉirkaŭ.
D. aŭ del.	delegito.
Dir.	direktoro.
D-ro	Doktoro.
D-rino	Doktorino.
E.A.N.A.	Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko.
ekz.	Ekzemple aŭ ekzemplero.
eld.	eldoninto.
E.L.N.A.	Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko.
E.P.C.	Esperanto Publishing Company Ltd.
Est.	Estimata.
F-ino	Fraŭlino.
F.K.	Fundamenta Krestomatio.
F.L.E.	Asocio de Laboristaj Esperantistoj, "Fidu la Estontecon".
Fl.L.E.	Flandra Ligo Esperantista.
G.E.A.	Germana Esperanto-Asocio.
G.E.E.	Grupo de Edukistoj Esperantistaj (Franca).
H.E.A.	Helena Esperanto-Asocio.
H.E.F.	Hispana Esperanto-Federacio.
i.a.	inter aliaj.
I.A.L.A.	International Auxiliary Language Association.

I.A.P.K.	Internacia Asocio de Poŝmarkkolektantoj.
I.C.K.	Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado. (Ne plu ekzistas).
I.E.F.	Itala Esperanto-Federacio.
I.E.L.	Internacia Esperanto-Ligo (kunfandita kun U.E.A.).
I.E.M.W.	Internacia Esperanto-Muzeo en Wien.
I.F.E.F.	Internacia Federacio Esperantista Fervojista.
I.K.E.S.	Internacia Komisiono Esperanto kaj Sociologio.
I.K.U.E.	Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.
il.	ilustrita.
I.L.E.I.	Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.
Inĝ.	Ingeniero.
I.S.A.E.	Internacia Scienca Asocio Esperantista.
I.S.U.	Internacia Somera Universitato.
J.E.F.	Jugoslavia Esperanto-Federacio.
J.E.I.	Japana Esperanto-Instituto.
k.	kaj.
k.a.	kaj aliaj.
kas.	kasisto.
k.c.	kaj cetere.
k-do	kamarado.
K.E.A.	Kuba Esperanto-Asocio.
K.E.L.	Kroata Esperanto-Ligo.
K.E.L.I.	Kristana Esperantista Ligo Internacia.
K.E.S.	Kvakeraj Esperantista Societo.
k-io.	kompanio.
kp.	komparu.
k.s.	kaj simile.
k.t.p.	kaj tiel plu.
lab.	laborista.
L.E.A.	Laborista Esperanto-Asocio.
L.E.E.N.	Nederlanda Esperanto-Asocio "La Estonto Estas Nia".
L.E.S.S.	La Esperanto-Spiritista Societo.
L.K.	Lingva Komitato (ne plu ekzistas).
L.K.K.	Loka Kongresa Komitato.
N.B.	Notu bone.
N.E.L.	Norvega Esperantista Ligo.

n-ro.	numero.
N.Z.E.A.	Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.
p.	paĝo.
p.a.	per adreso.
p.K.	post Kristo.
pk.	poŝtkarto.
pm.	poŝtmarko.
Prez.	Prezidanto.
Prof.	Profesoro.
proks.	proksimume.
P.S.	Posta skribo.
ptm.	posttagmeze.
P.T.T.	Poŝto, telegrafo kaj telefono.
P.V.	Plena Vortaro.
R.B.L.E.	Reĝa Belga Ligo Esperantista.
Red.	Redaktoro.
resp.	respektive.
rim.	rimark(ig)o.
rpk.	respondkupono.
S-ano.	Samideano.
S.A.T.	Sennacieca Asocio Tutmonda.
S.E.F.	Sveda Esperanto-Federacio.
sek.	sekretario.
S.E.L.	Serbia Esperantista Ligo.
S.E.L.	Skolta Esperantista Ligo.
S.E.S.	Svisa Esperantista-Societo.
S.I.E.L.	Slovenia Esperanto-Ligo.
S-ino	Sinjorino.
S-ro	Sinjoro.
S.T.E.L.O	Studenta Tutmonda Esperantista Ligo.
t.e.	tio estas.
T.E.J.O.	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.
T.E.J.A.	Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio.
T.E.K.A.	Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio.
t.n.	tiel nomata.
trad.	tradukinto.
U.E.A.	Universala Esperanto-Asocio.
U.E.F.	Unuiĝo Esperantista Franca.
U.K.	Universala Kongreso.
U.L.	Universala Ligo.
v.	vidu.
vol.	volumo.
Z.	Zamenhof.

Se vi volas esti Delegito

Ĉiu sincera kaj celkonscia Esperantisto volas — kaj serĉas rimedojn — servi al la granda ideo, kiu nin ligas komune. Unu el la plej utilaj rimedoj, kuniganta la idealon de SERVEMO kun tiu de PRAKTIKA APLIKADO, estas la ofico de Delegito. Tiu ofico donas al veraj samideanoj la eblon antaŭenigi nian aferon per unika elmontro de solidaro.

Se en via loko ne troviĝas Delegito (la vorto **delegito** inkluzivas D, VD kaj FD) kaj se vi havas inklinon oferi ion al via idealo, vin proponu. Tion faru tamen, ne en spirito de favor-faro al U.E.A. (kiu provizas nur la rimedojn) sed kun la konscio, ke la ofero estas al Esperantismo. Jen la simplaj reguloj, kompilitaj nur por garantii la efikan funkcion de la Delegita Servo.

1. Ĉiu delegito bone sciu la lingvon Esperanto skribe kaj parole.
2. Delegito devas esti almenaŭ Membro-Abonanto, ĉar li bezonas la Jarlibron kaj la oficialan gazeton ESPE-RANTO.
3. Antaŭ ol rajti kandidati kiel delegito, oni devas esti paginta kiel individua membro de U.E.A. minimume du sinsekvajn jarojn. (Montriĝis, ke multaj novaj membroj facilanime akceptas la oficon kaj same facilanime ne renovigas sian membrecon).
4. Fakdelegito reprezentu fakon, pri kiu li estas vere kompetenta. Ni ne akceptas fakojn fantaziajn kaj neseriozajn. Se oni volas kaj povas esti fakdelegito pri pli ol unu fako, oni plenigu apartan respondilan dokumenton por ĉiu fako.
5. Delegito havu minimume 21 jarojn.
6. Delegito por junularo havu min. 18 jarojn.

Se viaj kompetentoj konformas al la ĉi-supraj kondiĉoj, **petu Delegit-Respondilon ĉe la Ĉefdelegito aŭ Peranto en via lando se tiu ofico ekzistas; sed se ne, ĉe la Centra Oficejo de U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.**

LITERUMA ALFABETO

Asfalto	Gumo	Kilogramo	Salato
Barbaro	Giraf	Legendo	Silingo
Centimetro	Hotelo	Maŝino	Triumfo
Cefo	Haoso	Naturo	Universo
Doktoro	Insekto	Omnibuso	ŭ Universo-hoko
Elemento	Jubileo	Papero	Vulkano
Fabriko	Jurnalo	Rekordo	Zinko

Kiam vi telefonas Esperante kaj devas literumi iun vorton, indiku la literojn per iliaj nomoj en ĉi-supra tabelo. Tio faciligos la komprenon konsiderinde.

Diru en telefono ekz. :

"Por viziti min, volu uzi tramon kun surskribo "Montchat' Mi literumas: 'Maŝino omnibuso naturo triumfo centimetro hotelo asfalto triumfo'."

Se en la vorto enestas literoj, kiuj ne apartenas al Esperanta alfabeto, nomu ilin jene :

q = kuo	x = ikso
w = ĝermana vo	y = ipsilono

Ne diru por w "duobla vo", ĉar tio povus esti ankaŭ "vv" !

Literojn kun aldonaj signoj nomu jene :

á = a streko-supren	˘ = a hoko
â = a streko-falanta	ã = a du-punktoj
ã = a ĉapelo	ø = o trastreko
ã = a ondo	ĉ = ĉo pinthoko
â = a streko-kuŝanta	ç = ĉo subhoko

NOTOJ PRI LA ADRESARO DE LA DELEGITOJ

Tiu ĉi Adresaro estas ordigita ĝis la 15 decembro 1958. Por ĉiuj postaj ŝanĝoj aŭ korektoj de la Delegita Adresaro oni vidu la "Oficialan Informilon" en Esperanto.

MALLONGIGOJ

CD = Ĉefdelegito
D = Delegito
VD = Vicdelegito
FD = Fakdelegito
JD = Junular-delegito
EO = Esperanto-oficejo
Adr. = adreso

et. post tel. = post havigo de la koncerna numero oni (numero) petu la linion kies numero sekvas la vorteton "et".

* = en la urbo estas grupo, pri kiu oni havigu ĝisdatajn informojn ĉe tiea delegito. Vidu ankaŭ la liston de grupoj en tiu ĉi Jarlibro.

La Redakcio de la Jarlibro ne repondacas pri la tekstado de la sekvantaj detaloj, kopiitaj laŭ la informoj senditaj de la delegitoj.

Ĉef-Delegitoj de U.E.A.

Argentino	J. C. Milkuschutz, Sarmiento 3298, Olivos.
Aŭstralio	K. G. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E. 8.
Aŭstrujo	Maj. Oskar Sinner, Schönbrunner-Allee 53, Wien XII. Pĉk. 38751.
Brazilo	Antonio José Vaz, Rua Paraná 71, Rio de Janeiro.
Bulgarujo	Canko Murgin, str. Iskar 46, Sofia 29.
Danlando	Søren Andresen, Friggsvvej 10, st. tv. Fredericia. Pĉk : 12692.
Finnlando	Joel Vilkki, Somero.
Francujo	J. Guillaume, Esperanto-oficejo, 34 rue de Chabrol, Paris 10.
Germanujo	F. Helfers, Postschliessfach 692 (17a), Karlsruhe.
Hispanujo	R. Molera, Calle Hospital 13, Moya.
Italujo	Luigi Minnaja, Viale Giulio Cesare 223, Roma.
Japanujo	D-ro Hideo Yagi, 76 Kawaramachi, Okayama.
Jugoslavujo	S-ino E. Lapenna, Nova Ves 32-III, Zagreb.
Nederlando	J. Telling, Schietbaanlaan 106-a, Rotterdam C.
Norvegujo	Alfred Skyberg, Østensjøvn 118a, Oslo-Bryn. Pĉk: 13329.
Nov-Zelando	J. T. Allan, 12 Lonsdale Crescent, Wellington E 3.
Pollando	R. Sakowicz, Skrytka 26, Nowa Sol (Silezio).
Portugalujo	J. Antunes, Rua dos Fanqueiros 106 4 dto., Lisboa.
Svislando	O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.
Urugvajo	D-ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos (Florida).
Usono	D. E. Parrish, 328 West 46th Street, Los Angeles 37, Cal.

Perantoj de U.E.A.

Belgujo	Reĝa Belga Ligo Esperantista, J. Soyeur, Rue du Chêne 91, Seraing. Flandra Ligo Esperantista, S-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge.
Brazilo	Brazila Esperanto-Ligo, Praça da República 54-I, Rio de Janeiro.
Britujo	Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Avenue, London, W.11.
Bulgarujo	Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Stalin 40, Sofia.
Ceĥoslovakujo	..	J. Sustr, Dlouha 10, Praha.
Danlando	Centra Dana Esperantista Ligo, Vejlemosevej 60, Holte.
Irlando	L. O. Uhiginn, 8 Cypress Road, Mount Merrion, Dublin.
Islando	Federacio de Islandaj Esperantistoj, Pósthólf 1081, Reykjavik.
Italujo	Itala Esperanto-Federacio, Corso Galileo Galilei 22, Torino.
Japanujo	Japana Esperanto-Instituto, Hongo Motomati 1-13, Tokio.
Kanado	W. D. B. Hackett, 362 Soudan Avenue, Toronto 7.
Kubo	Raul Juárez-Sedeño, Apartado 570, Luaces 155, Camagüey.
Maroko	René Cagnon, 9 rue Coli, Rabat.
Meksikio	F. Azorin, Str. Guadalquivir 41. - E, México D.F.
Nov-Zelando	N.Z.E.A., P.O. Box 3214, Auckland.
Pollando	Pola Esperanto-Asocio, Nowy Swiat 27, Varsovio.
Sarlando	G. Feis, Hauptstr. 70, Altenwald.
Sud-Afriko	E. W. Woodruff, c/o Witwatersrand Techn. Coll., P.O. Box 3293 Joh.burg.
Svedujo	Sveda Esperanto-Federacio, Tegelbacken, Stockholm C.
Turkujo	Hasan Kocaman, Muhürdar Caddesi 81, Kadiköj-Istanbul.
Venezuelo	L. Moulines, Apartado del Este 4845, Caracas.

ACOROJ

Horta (Faial—Açores). 7.000.

D : Domingos Garcia, apotekisto.

Velas (S. Jorge). 1.200.

D : Manuel Gomes, librotenisto, Tel. 8 (Velas).

FD (Geografio) : La D.

ALĜERIO

Alger. 500.000.

FD (Naturscienco) : F. Jelenc, gimnazio instruisto, 24 rue de Gascogne, Maison-Carrée.

Maison Carrée. 50.000.

D : F. Jelenc, gimnazio instruisto, 24 rue de Gascogne.

Nemours (Tlemcen). 15.000.

D : Fernand Micoud, instruisto, B.P. 88.

FD (Edukado) : La D.

Oued-Athménia (Constantine) 2500.

D : René Lavallée, juĝa interpretisto, (interprète-judiciaire). Tel. 23.

ANGOLO

Benguela. 4.000.

FD (Juro) : A. B. Martins da Cruz, advokato, Caixa postal 50.

Lobito. 5.000.

D : J. Alves Marques, notaria helpisto, Caixa postal 211.

Luanda. 120.000.

FD (Filozofio-Krishnamurti) : J. M. A. Soares Guedes, geologia preparisto, Caixa Postal 1282, cuca, Estrada da Cazenga. Tel : 2810.

Aktualaj Problemoj

de la Nuntempa Internacia Vivo

Prof. D-ro Ivo Lapenna

**Prezo :
5 gld.**

Originale verkita en Esperanto de brila stilisto kaj mondkonata aŭtoro
Libro, kiu "majstre instruas kaj instigas al pensado" (Scienca Revuo)

Mendu ĉe via libroservo aŭ ĉe U.E.A.

ARGENTINO

Cefdelegito : S-ro J. Milkuschutz, Sarmiento 3298, Olivos.

Buenos Aires. 3.500.000.*

D : J. Hess, mekanisto, Tupac-Amarú 1132, tel : 69-5167.

VD : R. G. Calógero, oficisto, Gualeguaychú 1081 (Suc. 7).

FD (Arkitekturo) : F. H. Bereterbide, arkitekto, Segurola 3525. Tel : 50-4646.

FD (Filatelo) : L. Vicino, komercisto, Maza 1448. Tel : 97-0438.

FD (Presado) : A. M. Corral, presisto, A. Magariños Cervantes 2650, Tel. 59-6339.

FD (Religio-Universala) : S-ro Andres Villafranca, vitalisto, Méjico 2884, tel : 97-7544.

La Plata (Buenos Aires). 300.000.*

D : O. B. Larraburu, librotenisto, Casilla de Correo 14.

Necochea (Buenos Aires). 24.000*.

D : E. Balech, profesoro, Casilla de Correo 64. Tel : 882.

FD (Farmacio) : J. A. Diez, farmaciisto, Calle 62, no. 2946. Tel : 483.

FD (Filatelo) : A. S. Caruso, ŝtatoficisto, str. Arenales 65.

Rosario (Santa Fé). 600.000.*

D : E. Kohei, oficisto, Rubén Darío 1751. Tel : 99640.

VD : Hugo Antonio Lingua, ŝtata oficisto, La Paz 1032, R. 44. Tel : 81364.

FD (Filatelo) : La VD.

San Isidro (Buenos Aires). 19.634.

D : D-ro M. H. Catalano, ĉemiiisto, Olegario Andrade 113.

San Nicolás (Buenos Aires). 40.000.

D : Iberio Mindoro Rodriguez, oficisto, Leandro N. Alem 108.

Venado Tuerto (Santa Fé). 25.000.*

D : S-ro Eduardo Creus, farmaciisto, Calle San Martín n-ro 200, Tel. : 1100.

Villa Revol (Cordoba). 500.000.

FD (Modaj revuoj) : Jozefo Matilla, vendisto, Villa Revolstrato 4.

AŬSTRALIO

Cefdelegito : S-ro Kenneth Gordon Linton, 11, Poplar St.
South Caulfield, S.E. 8, Melbourne, Victoria,
Tel : LF 1678 & MU 7258.

Adelaide (South Australia). 484.000.*

D : F-ino W. Addis, 25 Greville Avenue, Flinders Park.

Albury (New South Wales). 17.000.

D : F. V. Taylor, instruisto, 653 Jones Street, Albury 3 S.
Tel : 1334.

Ballarat (Victoria). 48.000.

D : K. Podenas, elektristo, 109 Hickman Street.

Brisbane (Queensland). 503.000.*

D : S. L. Parry, danc-muzikisto, Ford Street, Albion,
N.2. Tel : M 6097.

V.D. S. H. Beck, eks.-armea majoro, 53 Clyde Road,
Herston n.9. Tel. 2.7691.

Canberra (A.C.T.). 35.000.*

D : S. Fulop, tajloro, 26 Bundeela St., Narrabundah.
FD (Religio-Katolikismo) : La D.

Devonport (Tasmania). 12.500.

D : C. Ramsay, eks-ŝtatoficisto, Esplanade, East Devon-
port.

Kalamunda (W.A.). 2.300.

D : S-ro Roy Thomson, spicisto, 49 Railway Road. Tel.:
TAL. 37.

Kalgoorlie (Western Australia). 23.000.

D : C. P. Hehir, taksi-veturigisto, 1 Brookman Street,
Tel : 243.

Melbourne (Victoria). 1.525.000.*

D : K. G. Linton, fabrikisto de metalaj etikedoj, 11 Poplar
Str. South Caulfield S.E.8. Tel: LF1678; oficeja MU7258.

FD (Kvakerismo): D-ro F. J. Williams, 392 Albert Street,
East Melbourne, C.2. Tel : FB 1809.

ANGLA ANTOLOGIO

Eldona Fako de U.E.A.

PERTH

Okcidenta Aŭstralio

PORDEGO AL SORĈA KONTINENTO!



Perth estas la unua Aŭstralio
Ĉefurbo atingata per la ĉefaj
internaciaj aer- kaj ŝip-vojoj
de Britujo kaj Eŭropo.

Komencu vian Aŭstralian
Ferion en Perth



Informojn ĉe :

W.A. Government Tourist Bureau,
Hay Street, Perth, Western Australia.

AŬSTRALIO

Moe (Vic). 8.800.

D: S-ro I. T. Maddern, instruisto, High School. Tel.: 305.

Mount Waverley (Victoria). 50.000.

D: S-ino I. Fink, ĵurnalistino, 100 Headingley Road. Tel: J.B.2880.

Parkes (New South Wales). 8.000.

D: A. Towsey, instruisto, 94 Currajong St., Parkes 7W.

Perth (W.A.). 38.000.*

D: Ruth McGrath, dommastrino, 41 Reynolds Road, Mount Pleasant. Tel. 642339.

Proserpine (Queensland). 4.600.

FD (Fotografio): B. T. Kostinek, fotografisto, Proserpine Photo Studios. Tel: 260.

Redcliffe (Queensland) 18.000.

D: Violet Fraser, dommastrino, 76 Prince Edward Parade, Queen's Beach, Tel. Redcliffe 1538.

Rockhampton (Queensland). 40.000.

D. Neil Russell, lernejestro, 136 Talford Str. Tel.: 2209 (lernejo).

Seymour (Victoria). 12.000.

D: P. Holmes, elektristo, 8 Villiers St. Tel: 153.

Sydney (New South Wales). 1.864.000.*

D: J. Matasin, meblofabrikisto, 1 Coorabin Road, Northbridge, Tel: MX 1227 aŭ XL 1748.

VD: W. R. Lamb, pensiulo, 92 Walker St., N. Sydney.

VD: F-ino Edna Dash, radio-teknikistino, 26 Edgeware Road, Enmore.

FD (Arkitekturo): P. E. Schwerin, arkitekto, 1 Carabella Flats, McDougall Street, Milsons Point.

FD (Arto): Wreford Chandler, instruisto, 57, Northcote St. Crow's Nest.

FD (Astronomio): C. Hickey, inspektisto, P.O. Box 23, Annandale.

FD (Religio): I. Seriŝev, pastro, G.P.O. Box 2988, 767 Prince's Highway, Tempe, Cooks River.

Wyalkatchem (Western Australia) 1750.

D: John S. Finch, c/o Hospital Wyalkatchem. Tel. Wyalkatchem 5.



Graz

(par. Grac !), post Vieno la plej granda urbo de AŬSTRIO, ĉefurbo de la liglando STIRIO, estas moderna urbo. Krom ĝia pulsanta vivo akceptas la vizitanton la kvieto de kuraĉloko en la vastaj parkoj sur la kastelmonto kaj div. lokoj. GRAZ estas la plej sudorienta ĝarden- kaj kongresurbo de Aŭstrio. Ĝia signifo en ekonomia kaj kultura rilatoj estas rekonita, (du foiroj en ĉiu jaro, teatro-kaj liberaeraĵ ludoj, sporto). De GRAZ vi povas facile atingi la altmontaron. Elektu GRAZ kiel vian vojaĝcelon !

AŬSTRUJO

Cefdelegito : Maj. O. Sinner, Schönbrunner-Allee 53,
Wien 12. Pĉk. : 38751.

Aflenz-Kurort (Steiermark). 1.000.

D : P. Angerer, komunumoficisto, Draibach 41. Tel : 6.

Eisenstadt (Burgenland). 5.500.

D : H. Bauer, instruisto, Hartlsteig 13.

Ernstbrunn (Niederösterreich). 2.400.

D : Hans Huber, instruisto, Simonsfeld, Post Ernstbrunn.

Felixdorf/Südbahn (Wr. Neustadt). 2.500.

D : J. Schwartz, ekspedejestro, Bräunlichstrasse 12.

Graz (Steiermark). 250.000.*

D : A. Podrepschek, ŝtatificisto, Sackstrasse, 16-I, Graz I.
Tel : 94-1-11/436.

VD : J. Eder, fruktkultura majstro, Stattegg-Eichberg 72,
Post Graz-St. Veit.

FD (Akcidentoj, malebligo de) : D-ro O. Meister, pensiita
ĉefoficisto, Burggasse 16/II.

FD (Fruktokulturo) : La VD.

FD (Oficistaj aferoj) : La D.

Innsbruck. 100.000.

FD (Lingvoj) : H. Ölberg, lektoro de Esperanto, Erzherz.
Eugenstr. 5. Tel : 74859.

Kaltenleutgeben (N. Österreich). 2.100.

D : Josef Pich, librotenisto, Hauptstrasse 63. Tel : 11.
FD (Muziko : citro) : La D.

Kitzbühel (Tirol). 8.000.

D : F-ino M. L. Planck, oficistino, Hinterstadt 34-II.
FD (Religio-Katolikismo) : La D.

Klosterneuburg (N.O.) 26.000.

D : F. W. Ebner, komercisto, Markgasse 5. Tel : 13 69

AMIK(IN)O ? ĈU VI DEZIRAS RIPOZI ?

SE JES, ATENTU :

La verda Stirio

Kvankam por la internacia turismo la arbaroriĉa kaj tial ĉiam verda lando Stirio ne jam estas same konata kiel aliaj partoj de Aŭstrujo, ĝi tamen apartenas al la plej rigardindaj teritorioj por vojaĝoj de la multe laŭdata turistlandaro Aŭstrujo. Iom flanke de la granda fluego de l'eŭropaj turistoj la "verda limlando" povis konservi la originalecon de sia naturo kaj estas hodiaŭ inter la tre malmultaj regionoj, kiuj al ferianto ankoraŭ donas vere trunkvilon kaj refreŝigon.

La ĉarmo de Stirio estas en la multkolora varieco de ĝiaj formoj. De la ĉenoj de vitoriĉaj montetoj en la suda landero ĝis la gigantaj rokaroj de la norda landparto evidentiĝas la unika mozaiko de la stiria pejzaĝo kiel ideala celo por ferio. Por siaj vizitantoj Stirio pretigadas abundaĵon da interesaj kaj trovindaj objektoj en pli ol 200 ferilokoj kaj en sia malnova omaĝinda ĉefurbo Graz (elp. Grac.). Stiloj de vivo, arto, kulturo kaj folkloro bone evoluas tie en vere aŭstra atmosfero dank' al tiu gaja kaj afabla karaktero, kiu dekomence estas propre stiriana. Tial ne mirigas, ke gasto en Stirio fartadas bone, egale, ĉu li pasigas sian libertempon en komforta kuraĉloko en la altmontaro aŭ en modesta somerumejo en monteta regiono. Kaj kio krome agrable surprizas la ferian vojaĝanton : Stirio estas ne nur bela, sed ankaŭ malmultekosta lando por feriantoj.

**DO, VENU EN LA VERDAN STIRION !
VI NE PENTOS !**

Informojn donas ĉiu vojaĝburoo kaj la Landa Fremduloficejo por Stirio en Graz, Herrengasse 16.

KONSULTU LA JARLIBRON DE UEA !

AŬSTRUJO

Knittelfeld (Steiermark). 15.000.*

D : D-ro A. Halbedl, advokato, Bahnstr. 45. Tel. 6-83.
VD : R. Pawlik, eks-fervojesto, Stubalpenstrasse 33.
FD (Juro) : La D.
FD (Turismo) : T. Zuber, eks-fervojesto, Landschach 4.

Landeck (Tirol). 8.000.

JD : A. Hilkersberger, maŝinestro, Lotzweg 15.

Linz. 189.000.*

D : H. Gerbert, ofickonsilisto, Blütenstr. 3, Linz-Urfahr.
FD (Abelkulturo) : Leopold Kaufmann, Leonfeldnerstr. 53.
Tel : 2-32-35.
FD (Naturismo) : La D.

Plainfeld (Salzburg). 320.

D : J. Kaps, paroĝestro, Post Hof bei Salzburg.

Pöls ob Judenburg (Steiermark). 4000.

D : R. Wick, oficeja konsilisto, Gemeindeamt. Tel. 6.

Pötschach (Niederösterreich). 5.000.

D : Otto Küttelwascher, instalisto, Pötschach III-11/4.

Saalfelden (Salzburg). 9.000.

D : F-ino E. Oberlechner, instruistino, Saalfelden 219.
Tel : 510.

St. Pölten (N. Österreich). 40.000.

VD : A. Balagué, oficestro, Kirchenweg 12.
FD (Pacaferoj) : La VD.

St. Veith a Triesting (NO).

D : S-ino A. Tempus-Listner, pensiita superinstruistino,
Fabrikstrasse 20.

Solbad Hall (Tirol). 11.057.

D : S-ino E. Beier, Speckbachergasse 5.

Wörgl / Tirol

Modernaj hoteloj kaj gastejoj kun komfortaj ĉambroj kaj fluanta akvo varma kaj malvarma volonte gastigas vin. Viena kuirarto zorgas por la bonfarto de la eĉ plej postulemaj stomakoj. Esperantistoj tutmondaj loĝas kaj aĉetas prefere en jenaj rekomendindaj gastejoj respektive negoĉejo :

FRANZ SCHAR

Bahnhof-Restaurations
(stacidoma restoracio)

Wörgl

GASTHOF-CAFÉ HAUSER

Bahnhofstrasse 51

Wörgl

Andrä Lenk

Gasthof "Neue Post"
(ĉe urba preĝejo)

Wörgl

Café-Restaurant

"CENTRAL", Wörgl

Bahnhofstrasse 27

Jakob Riedmann jun.

Reiseandenken (vojaĝ-memoraĵoj)

Wörgl, Speckbacherstrasse

Venu al Wörgl!

AŬSTRUJO

Steyr (O. Österreich). 40.000.*

D : H. Zeller, kemiisto, Schlüsselhofgasse 25.

VD : S-ano Gottfried Hofstätter, dipl. naĝmajstro, Schwimmschulstrasse 15.

FD (Sporto-Naĝinstruado kaj savnaĝado) : La VD.

Villach (Kärnten). 30.000.

D : F. Watzinger, direktoro de ĉeflernejo, Vogelweidepark 5, Lind.

Wien. 1.750.000.*

D : O. Sinner, pensiulo, Schönbrunner-Allee 53, Wien XII.

VD : Dr. phil. Ernst J. Görlich, lektoro, Arsenal Obj. V. III/III/8. Tel. A.-29-5-75 (oficejo).

VD : Mr. Franz Höfert, apotekisto, Penzingerstr. 121, Wien XIV. Tel. 82.27.104.

VD : Franz Nawratil, kontoristo, Reuenthalgasse 2 V. IV. 20, Wien XV.

VD : Ernst Majtanić, frizisto-majstro, Wien 23-Kalksburg, Breitenfurterstrasse 533.

FD (Kosmetiko) : La VD (Majtanić).

FD (P.T.T.) : J. Janecka, poŝtisto, Diemgasse 3/14, Wien XIX. Tel : A 26-2-34.

EO : Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Wien I.

Wiener-Neustadt (N. Österreich). 36.000.*

D : G. Schmid, oficisto, Wöllersdorferstr. 25-II-6.

VD : F. Schügerl, oficisto, Ulschalkgasse 33-I-6.

Wieselburg an der Erlauf (Niederösterreich). 2.300.

D : Ing. H. J. Plehn, fabrikdirektoro, juĝeja eksperto por bendoŝtalo kaj segiloj, Bienensteingasse 3. Tel. : 2.

Wörgl (Tirol). 7.000.*

D : Hans Steiner, financoficisto, Angatherweg 1/III.

FD (Turismo) : La D.

**ĈU VI JAM VARBIS INDIVIDUAN MEMBRON
DE U.E.A. EN LA ZAMENHOF-JARO ?**

WÖRGL / TIROL



Zamenhof-Monumento en Wörgl
(Foto : Hans Steiner)

Situanta enmeze de altaj montoj kun odorantaj abiaroj la urbo ĉe la rivero "Inn" ne nur somere allogas arojn da fremduloj, sed ankaŭ vintre pro siaj unikaj skisportejoj kun seĝo- kaj skiliftoj en la apuda altvalo Wildschönau.

Por naĝi kaj bani vi trovas ĉirkaŭe 12 lagojn kaj banejojn, facile kaj rapide atingeblajn.

Wörgl estas la krucpunkto de la fervojlinioj Nordo-Sudo, Oriento-Okcidento kaj elirpunkto por belegaj migradoj tra arbaraj kaj altmontar-ekskursoj. Famigis la urbo pro la tiama "Libermono de Wörgl". (Ci tie estas ankaŭ la centro de la E-movado de Tirol/Vorarlberg).

Sur la plej bela placo de la urbo, antaŭ la stacidomo, enmeze de belegaj florarangoj, staras la Zamenhof-Monumento, iniciatita de Hans Steiner kaj solenege inaŭgurita la 27.7.1952, tiutempe la ununura monumento en Eŭropo honore al la aŭtoro de Esperanto.

Kore invitas kaj volonte informos vin :
Verkehrsamt

WÖRGL-WILDSCHÖNAU

Innsbruckerstrasse 6

BELGUJO

Perantoj: Reĝa Belga Ligo Esperantista, pere de J. Soyeur,
Rue du Chêne, 91, Seraing. Pĉk. 1337.67.

Flandra Ligo Esperantista, pere de Fr. Cou-
wenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge.
Pĉk. 4161.35.

(B) — nomita de R.B.L.E.

(F) — nomita de Fl.L.E.

Aalst (Oost-Vlaanderen). 40.000.

D : F-ino P. De Cock, oficistino, Pieter Couckestraat 2.

Antwerpen. 500.000.*

D (B) : S-ino L. Bernaerts-Toussaint, 38 Bosmanslei.
Tel : (03) 37.60.51.

D (F) : E. Cortvriendt, komercisto, Diepestraat 44. Tel :
(03) 324430.

VD : A. Faes, 38 rue Albert Grisar. Tel : (03) 32.67.21.

FD (Bestprotektado) (F) : J. Jacobs, eks-profesoro,
Boomsteenweg 444. Tel : (03) 3771.20.

FD (Fotografio) : J. J. De Graeve, fototeknikisto, Ceder-
laan 52, Antwerpen I.

FD (Higieno) : H. Vermuyten, urboficisto, Albertstraat 16.

FD (Jurnalismo) : M. Jaumotte, industriisto, 44 De Bruyn-
laan, Wilrijk. Tel : (03) 377758.

FD (Sociaj aferoj) : J. R. Van Eynde, laborinspektoro,
Cederlaan 11. Tel : 37.58.61.

FD (Turismo) : S-ino Blanche Geers, Grote Beerstraat 7.
Tel : 39.87.42.

FD (Vitraĵoj) : Jules Verstraeten, vitrokomercisto, Por-
tugesestraat 69, Hoboken. Tel : 37.92.51.

Antverpena Esperanto-Grupo

"LA VERDA STELO"

(Societo sen profita celo, fondita en 1907)

Kunveno j : "De Witte Leeuw", 4 Frankrijklei,
(avenuo de Francujo) apud la Flandra Operdomo,
ĉiuvendrede de la 20.30 ĝis la 23a horo.

VIZITANTOJ ESTAS ĈIAM BONVENAJ

Petu la trimonatan programon de la grupaj kunsidoj

Antverpeno

Arturbo

Mondhaveno

Turisma Centro



Informoj : Propagando kaj Turismo, Pelikaan-
straat 6, Antwerpen, Belgujo.

BELGA ESPERANTO-INSTITUTO

Koopera Societo (Belga Ŝtatgazeto 12.3.26 — 2253)

Antverpeno - Oostenstr. 26

Poŝtĉekkonto N-ro 1689.58

Eldonas - Presas - Fabrikas - Vendas - Abonas.

Libroj - Insignoj - Propagandiloj - Korespondaj

Kursoj - k.t.p.

Kelkaj el niaj eldonaĵoj

Esperanto Leerboekje (Gramatiko, Ekzercaro, Vortaro) Fr. 2.-**Esperanto Premier Manuel** „ „ „ „ 2.-**Unuel** - Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia (originala teksto el Fundamenta Krestomatio kun nederlandlingva traduko de W. de Schutter) „ 8.-
sama kun franclingva traduko de M. Jaumotte „ 8.-**Rollet de l'Isle** - Initiation à l'Esperanto „ 10.-**L. L. Zamenhof** - Fundamento de Esperanto (franca) „ 10.-**Astene** (Oost Vlaanderen) 2200.

D : Maurice Vanderlinden, instruisto, Dorp 44. Tel. (09) 762192.

Blankenberge (West-Vlaanderen) 10.000.*

D : A. Marmenout, instruisto, Koninginnelaan 102.

FD (Instruado) : La D.

FD (Turismo) : F. Couwenberg, profesoro, Koninginnelaan 14.

Brugge 53.000.*

D (B) : C. Poupeye, juĝoregistraro, Elf Julistraat 32. Tel : (050) 359.78.

D (F) : F. Roose, Ste Klaradreef 59. Tel : (050) 31981.

VD (B) : S-ino M. De Baets-Huyghe, Potterierei 1.

FD (Filatelo) (F) : R. Iserentant, arma suboficiero, Blankenbergestwg. 72.

Bruxelles-Brussel 1.060.000.*

D (B) : Hector Castel, ŝtatfunkciulo, 29, square du Centenaire, Bruxelles-Ganshoren. Tel. (02) 2562.08.

D (F) : P. H. Mooij, pensiulo, 89 Avenue du Sacré Coeur, Brussel-9. Tel : (02) 79.80.22.

FD (Agrikulturo) : P. Van Geit, agrikultura inĝeniero, Villa Birdkanto, route de Lennik 429, Bruxelles 7.

FD (Bankaj aferoj) : J. Oleffe, bankoficisto, 22 Avenue de l'Aigle, Woluwe-St. Pierre, Brussel 15. Tel : (02) 33.88.59.

